

ĈU ESPERANTO PLIBONIGIS/PLIBONIGOS LA MONDON?

**Prelegserio de D-ro Márkus Gábor
en la Somera Universitato
dum la 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj**

**Loko: Fakultato en Panevėžys pri Teknologioj
kaj Negocado de Kaŭna Teknologia Universitato**

Tempo: 6-14 de Julio, 2019.

Dr. Márkus Gábor:
ĈU ESPERANTO PLIBONIGIS/PLIBONIGOS LA
MONDON?

ISBN 978-963-571-498-8

Ĉiuj rajtoj rezervitaj!

© Dr. Márkus Gábor, 2019

Fotoj sur la titolpaĝo:

Supre: la Aŭtoro prelegas en la 문일여자 고등학교 supermezlernejo

Malsupre: la Aŭtoro kun Dr. Poór Veronika, ĝenerala direktoro de
UEA dum la 8-a Azia Esperanto-Kongreso en Ĉinio

Eldonis:



**MAGYARORSZÁGI ESZPERANTÓ
SZÖVETSÉG**
HUNGARIA ESPERANTO-ASOCIO

1146 Budapest, Thököly út 58-60. Telefon: +36-70-932-7464

<http://esperantohea.hu>

dr.markus.gabor@gmail.com

Font: Times New Roman for Esperanto, Malgun Gothic for Korean

Presis: Vareg Hungary Kft., Budapest

Moto: *„Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu ni kuraĝe iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.”*

*(Our goal thru dense darkness is lightly aglimmer,
T'ward which we with courage are going.
And like the small star that in night-sky doth shimmer,
To us the direction 'tis showing.)*

L. L. Zamenhof

Enhavo

Prelegserio	5
1. De animala ekzisto ĝis diiĝo (La sepdek mil jara historio de homa kulturo)	5
2. La plej gravaj historiaj eventoj kaj iliaj lingvaj sekvoj	15
3. Enmigrado en Eŭropon kaj la Eŭropa dilemo	23
4. La spertoj de mia indramang-metoda lingvoinstruado	38
5. La espero (Ŝancoj, ke Esperanto fariĝos internacie akceptita komuna pontolingvo en la mondo)	44
6. Stelo super la Han-rivero	51
7. 한강에 빛나는 별 (Stelo super la Han-rivero – koree)	61
Aneksaĵo	70
Cent mil kilometroj por Esperanto (intervjuo kun D-ro Márkus Gábor en la 2016/decembra numero de revuo „ <i>Esperanto</i> ”, oficiala organo de UEA)	70

DE ANIMALA EKZISTO ĜIS DIIĜO¹

(La sepdek mil jara historio de homa kulturo)

En ĉi tiu prelego ni koncize trarigardos la sepdek mil jaran historion de homa kulturo kaj provos kompreni kial nur homoj povis evolui tiel rapide, ke ili dum malallonga tempo povis konkeri la tutan Terglobon. Nia trarigardo baziĝas sur la venontaj libroj:

1. „*La Origino de Specioj per Natura Selektado, aŭ konservado de la plej vivkapablaj rasoj en la batalo por vivo*” de Charles Darwin (Angla natursciencisto, geologo kaj biologo)
2. „*Genetiko de Origina Peko: La efiko de Natura Selektado al la Estonto de Homaro*” de Christian de Duve (Nobel Premiita Belga biokemiisto)
3. „*Sapiens: Konciza Historio de Homaro*” de Yuval Noah Harari (Israela historiisto kaj profesoro en la Historia Departamento de Hebrea Universitato de Jerusalem)

Nun vivas pli ol sep miliardoj da homoj en la mondo kaj tiuj homoj kredas la instruojn de diversaj religioj kaj ideologioj.

- Estas kristanoj kiuj kredas la Bibliion laŭvorte. Ili pensas, ke la mondo kaj ĉiuj vivaĵoj estis kreitaj per Dio dum ses tagoj.
- Islamanoj kredas, ke la kreado de la universo kaj ĉiuj estaĵoj okazis per la rekta ordono de Dio „*Estu, kaj ĝi estiĝis.*”
- Budhistoj pensas, ke la komenco de la mondo kaj la vivo estas nekonjektebla, ĉar ili havas nek komencon nek finon.
- Ateistoj supozas, ke ne estas dioj, ĉar la mondo kaj ankaŭ la vivo estiĝis nature.
- Darwin opiniis, ke la specioj de diversaj vivaĵoj estis kreitaj ne sendepende unu post la aliaj, sed ili evoluigis per natura selektado, kaj specioj adaptiĝis al ilia ĉirkaŭaĵo.

1 Prelego de la aŭtoro en la Japana-Korea Komuna Esperanto-Kongreso en Oktobro, 2018 en urbo Nara, en Japanio

Dum mia juneco mi vivis en la komunisma Orienta Eŭropo kaj tie oni instruis, ke estas du mondrigardoj: la religia kaj la scienca darvinisma. Oni instruis, ke la darvinisma koncepto estas materiisma kaj pro tio oni kutime pensas, ke Darwin estis ateisto. Sed tio tute ne estas vera. Li skribis la venontajn frazojn en sia verko „*La Origino de Specioj per Natura Selektado, aŭ konservado de la plej vivkapablaj rasoj en la batalo por vivo*”:

- *"Mi ne vidas kialon, kial la konkludoj en ĉi-tiu libro devus ŝoki la religiajn sentojn de iu ajn... Estas nobla koncepto de la dieco kredi, ke Li kreis nur malmultajn originajn vivaĵojn kaj Li donis al ili la kapablon por evoluiĝi al aliaj necesaj kaj utilaj organismoj."*²
- *"Multaj alte respektataj eminentuloj ŝajnas esti kontentaj kun la rigardpunkto, ke ĉiuj specioj estis kreitaj sendepende unu post la aliaj. Por mi pli bone kongruas kun la scio, kion ni scias pri la leĝo, kiun la Kreinto donis al la universo, ke la estiĝo kaj malestiĝo de ĉiuj vivaĵoj nuntempe kaj en la pasinteco okazis per duarangaj kialoj. Simile kiel duarangaj eventualaj kialoj kaŭzas naskiĝon kaj morton de individuoj."*³

La vidpunktoj de Darwin estiĝas klaraj, se ni legas liajn venontajn konkludojn: *"Ĉi tiu vidpunkto estas grandioza: Se ni supozas, ke kvankam la Kreinto spiris la vivon nur en unu estaĵon aŭ nur en kelkajn estaĵojn, tamen dum nia planedo cirkuladis laŭ la fiksita leĝo de graveco, tiom multaj belegaj kaj mirindaj vivaĵoj evoluiĝis el simpla komenco dum la lastaj jarmilardoj."*⁴

En la venontaj paĝoj ni trarigardos la plej signifecajn paŝojn de la evoluo de vivuloj laŭ la darvina teorio. Poste ni analizos la tempolinion de historio surbaze de la „*Granda Eksplozo*” teorio, kiu estis elpensite de Georges Henri Joseph Édouard Lemaître, katolika pastro

2 Published in New York by D Appleton & Co. 1861, Chapter XIV, on page 417, Conclusions

3 On page 424, 442/466

4 On page 425 (443/466)

kaj profesoro de fiziko en la Katolika Universitato en Leuven. Nun ĉi tiu teorio estas la plej vaste akceptite rilate al la temo: kiel estiĝis la universo. Laŭ tiu koncepto la plej gravaj eventoj de tempolinio de homa evoluo estas la venontaj⁵

- La plej malfrua vivo aperis – antaŭ 4 miliardoj da jaroj
- Unua simpla ĉelo aperis – antaŭ 3.9 miliardoj da jaroj
- Ĉelo kun kerno – antaŭ 2.1 miliardoj da jaroj
- Animaloj – antaŭ 590 milionoj da jaroj
- Mambestoj – antaŭ 220 milionoj da jaroj
- Homsimioj – antaŭ 75 milionoj da jaroj
- Homoideoj – antaŭ 28 milionoj da jaroj
- Homoj – antaŭ 2.5 milionoj da jaroj
- Modernaj homoj – antaŭ 500 milionoj da jaroj
- Tute (anatomie kaj kondute) modernaj homoj – antaŭ 200 milionoj da jaroj

Post tio ni trarigardu la tempolinion de historio de nia universo⁶:

- Materio kaj energio aperis – antaŭ 13.5 miliardoj da jaroj
- Formiĝo de Terglobo – antaŭ 4.5 miliardoj da jaroj
- Aperoj de organismoj – antaŭ 3.8 miliardoj da jaroj
- Lasta komuna avino de homoj kaj ĉimpanzoj – antaŭ 6 milionoj da jaroj
- Evoluo de genro *Homo* en Afriko – antaŭ 2.5 milionoj da jaroj
- Evoluo de diversaj homaj specioj – antaŭ 2 milionoj da jaroj

5 Fonto: https://en.wikipedia.org/wiki/Timeline_of_human_evolution

6 Yuval Noah Harari: SAPIENS – A Brief History of Humankind, paĝo IX.

- Homoj disvastiĝis el Afriko al Eŭrazio – antaŭ 2 milionoj da jaroj
- *Homo sapiens* (unu el la homaj specioj) evoluis en Orienta Afriko – antaŭ 200 mil jaroj

Laŭ kalkuloj⁷ nun estas pli-malpli ok milionoj da vivaj specioj sur nia Terglobo kaj ni vidas, ke antaŭ kelkcent jarmiloj aperis nia specio nomata „*homo sapiens*”. Tiu specio nekredeble vaste plimultnombriĝis kaj dum kelkaj jardekmiloj okupis ĉiujn teritoriojn kaj konkeris la mondon. Indas do pli detale trarigardi la evoluon de homo sapiens kaj la tempolinion de nia homa historio. La plej gravaj paŝoj de tiu evoluo estis la venontaj:

- La kogna revolucio, evoluo de fiktiva lingvo – antaŭ 70 mil jaroj
- Sapiens aperis en Aŭstralio, Aŭstralia megafaŭno malaperis – antaŭ 45 mil jaroj
- Sapiens aperis en Ameriko, Amerika megafaŭno malaperis – antaŭ 16 mil jaroj
- La agrikultura revolucio, malsovaĝigo de plantoj kaj bestoj, permanentaj kolonioj – antaŭ 12 mil jaroj
- Unuaj reĝlandoj, skribo, mono, religio – antaŭ 5 mil jaroj
- Unua imperio (la Akkada Imperio de Sargon) – antaŭ 4.25 mil jaroj
- Budhismo, universala vero „*liberigi ĉiujn vivaĵojn de sufero*” antaŭ 2.5 mil jaroj
- Han kaj Romia Imperioj, kristanismo (la religio de amo) – antaŭ 2 mil jaroj
- Islamo, Araba Imperio – antaŭ 1.4 mil jaroj
- La scienca revolucio, homaro komencis atingi senprecedenc-

⁷ <https://www.sciencedaily.com/releases/2011/08/110823180459.htm>

an potencon, Eŭropanoj komencis konkeri Amerikon kaj la oceanojn → La tuta Terglobo fariĝis unusola historia areno. La leviĝo de kapitalismo. – antaŭ 500 jaroj

- La industria revolucio, familio kaj komunumo anstataŭitaj per ŝtato kaj merkato, amasa estingo (malaperigo) de plantoj kaj bestoj – antaŭ 200 jaroj
- Homoj superas la limojn de Terglobo. Nukleaj armiloj minacas la pluvivon de homaro. Organismoj formiĝas pli ofte per inteligenta planado kaj konstruado, ol per natura selektado. Media poluado grave domaĝas la Terglobon – la nuna tempo
- Ĉu inteligenta konstruado (anstataŭ natura selektado) estiĝos baza principo de vivo? Ĉu *homo sapiens* estos anstataŭite per superhomoj? - gravaj demandoj rilate al la estonto.

Necesas klare vidi, ke dum la monda historio ekzistis multaj homaj specioj malgraŭ la fakto, ke nun estas nur unu. (Tio estas la *homo sapiens*.) La plej gravaj homaj specioj, kaj la lokoj kie ili aperis estas la venontaj:

- *Homo neanderthalis* (*Homo de Neander Valo*) – en Eŭropo
- *Homo erectus* (*Vertikala homo*) – en Orienta Azio
- *Homo soloensis* (*Homo de Solo Valo*) – en Java, Indonezio
- *Homo floresiensis* (*Homo de Flores insulo*) – en Indonezio
- *Homo denisova* (*Homo de Denisova Kaverno*) – en Siberio
- *Homo rudolfensis* (*Homo de Rudolf-lago*) – en Orienta Afriko
- *Homo ergaster* (*Laboranta homo*) – en Orienta Afriko
- *Homo sapiens* (*Inteligenta homo*) – en Orienta Afriko
- k.t.p.

Ĉiuj homaj specioj jam malaperis, escepte de *homo sapiens*. Prof-ro Harari pensas, ke ankaŭ *homo sapiens* malaperos, eble post mil jaroj

ili ne plu vivos sur la Terglobo.⁸ Li supozas, ke anstataŭ ni science konstruitaj „*posthomoj*” estiĝos, kiuj povos vivi eterne.

Estas tre gravaj demandoj: „*Kiel okazis la homa evoluo?*” kaj „*Pro kio nur homoj povis evolui tiel efike, ke dum mallonga tempo (dum sepdek mil jaroj) ili disvastiĝis en ĉiuj kontinentoj kaj ili povis konkeri la mondon?*”

Prof. Harari asertas, ke „*Antaŭ sepdek mil jaroj homo sapiens estis sensignifeca besto ... en Afriko. Simile kiel simio, meduzo, aŭ insekto. Sed dum la venontaj jarmiloj homoj fariĝis majstroj de la tuta Terglobo kaj teroristoj de la ekosistemo (natura medio). Hodiaŭ ili komencas estiĝi dioj, kiuj klopodas akiri eternan junecon kaj posedi la potencon de kreo kaj detruo.*”⁹

Sciencistoj supozas, ke nur tri mil homoj vivis antaŭ 500 mil jaroj, kaj nun vivas pli ol sep (baldaŭ pli ol ok) miliardoj.¹⁰ Tio signifas, ke inter milionoj da specioj de vivaĵoj, la homa evoluo estis la plej sukcesa. Je la komenco de la XIX-a jarcento la homaro konkeris la tutan Terglobon. La demando estas: „*Kiel okazis tio?*” Diversaj sciencistoj havas diversajn respondojn al ĉi tiu demando.

La Nobel-premiita Christian de Duve atestas, ke homaro povis akiri regantan rolon sur Terglobo per la procedo de natura selektado. La senprecedenca homa cerba potenco, agresemo, egoismo, sopiro por potenco kaj similaj homaj trajtoj genetike enkoditaj en homan naturon, kaj la granda adaptiĝemo ebligis, ke homaj socioj sukcese okupis ĉiujn teritoriojn de ĉiuj kvin kontinentoj.

Sed la prezo por tiu sukceso estis tre alta. Diversaj homaj triboj, sociaj grupoj, landoj kaj grupoj de landoj bataladis en teruraj militoj, kie centmilionoj da homoj estis mortigitaj. Krome, homaro detruis la

8 Harari: Sapiens, paĝo 7. kaj <https://www.theguardian.com/books/2014/sep/11/sapiens-brief-history-humankind-yuval-noah-harari-review>

9 Harari: SAPIENS – A brief history of humankind, paĝo 465

10 <http://www.prb.org/Publications/Articles/2002/HowManyPeopleHaveEverLivedonEarth.aspx>

vivkondiĉojn sur la Terglobo per diversaj manieroj. Ili detruis la naturan medion kaj kaŭzis, ke la planedo estiĝu danĝera loko pro kumulado de pli ol dek (laŭ kalkuloj dek kvin) mil nukleaj bomboj. Tiel estiĝis risko, ke la Terglobo povos fariĝi neloĝebla loko.

Nun la plej grandaj mondproblemoj estas la venontaj:

- Poluado de natura medio
- Rapida klimatsanĝo kaj tutmonda plivarmiĝo kaŭzita de senkontrola CO₂ emisio
- Tutmonda akvokrizo kaŭzita per pligrandiĝo de loĝantaro kaj industria akvopoluado
- Ekonomia kolapso kaj granda breĉo inter ekonomioj de riĉaj kaj malriĉaj landoj
- Malaperigo de centmiloj da vivaĵaj specioj
- Verda doma efekto
- Degradado de ekologio
- Malabundeco de naturaj rimedoj
- Malabundeco de renovigebla energio kaŭzita de limigite akireblaj fosiliaj brulaĵoj
- Nedaŭrigebla agrikulturo
- Dezertiĝo kaj senarbariĝo (100 - 200 milionoj da homoj estas tuŝitaj)
- Ozona truo (Terglobo ne plu estas protektite kontraŭ danĝeraj UV radioj)
- Kumulado de amasdetruaj armiloj (per ili la tuta planeto povas esti detruite)

Dum milionoj da jaroj antropeidoj transformiĝis homoj iom post iom. Kelkaj sciencistoj supozas, ke granda cerbo kaj uzo de iloj faris homojn homo. Aliaj atestas, ke teamlaboro pligrandigis la homan cerbon. Kiel ni vidis, Christian de Duve konkludis, ke agresemo kaj sopiro por potenco helpis la homaron konkeri la planedon.

La konkludoj de Profesoro Harari estas aliaj. Li klarigas, ke homoj havis grandan cerbon kaj uzis ilojn por laboro dum du milionoj da jaroj, tamen malgraŭ tio, ili estis nur malfortaj kaj sensignifecaj vivaĵoj inter aliaj animaloj.¹¹ Laŭ lia koncepto „*Homo sapiens konkeris la mondon danke al sia unika lingvo.*”¹² Harari atentigas, ke nur homoj, sole inter ĉiuj aliaj animaloj kapablas paroli pri fikcioj (imagitaj objektoj kaj estaĵoj, kiuj ne videblas, tuŝeblas kaj flareblas).

Laŭ tiu teorio homo sapiens povis fari kognitivan revolucion antaŭ sepdek mil jaroj pro la uzo de sia unika lingvo, kapablante paroli pri fikcioj. Sekve de tio ili fariĝis pli fortaj kaj efikaj ol ĉiuj aliaj homaj specioj, kiuj poste malaperis unu post la aliaj. Harari eĉ supozas, ke povis okazi, ke la membroj de nia „*homo sapiens*” specio kaŭzis la pereon de aliaj homaj specioj (ekzemple la neanderthalanojn, ktp.)

La unika karakterizaĵo de homa lingvo estas ĝia kapablo transdoni informojn pri fikcioj (imagitaj estaĵoj kiuj videble ne ekzistas), do ekzemple pri triboj, landoj, religiaj grupoj, industriaj kaj komercaj entreprenoj aŭ pri sociaj klasoj. Tiel tribaj, landoj, religiaj, entreprenaj aŭ politikaj estroj kapablis kunordigi la agadojn de homaj amasoj por atingi ilian komunan celon. (Ekzemple okupi teritorion de aliaj triboj aŭ landoj aŭ organizi revoluciojn kontraŭ diversaj politikaj sistemoj.) En tiu koncepto gravas kompreni, ke nur homo sapiens povas paroli pri imagitaj estaĵoj, kiujn ili neniam vidis, sed ĉiuj aliaj animaloj povas paroli nur pri realaj estaĵoj (ekzemple pri manĝo aŭ pri danĝera alia animalo).

Alia grava punkto de la teorio de Harari estas, ke laŭ li nur homo sapiens povas kredi neblaĵojn. Li atestas ekzemple, ke „*Neniu povus konvinki simion, ke li donu pecon de banano promesante lin, ke post lia morto li ricevos multegajn bananojn en simia ĉiela mondo.*”¹³ Resumante tiun koncepton oni povas konkludi, ke fikcio kapabligis nin kunagadi flekseble kaj multnombre, kaj tio estis la maniero, kiel ni (homo sapiens) povis konkeri la mondon.

11 La cerba grandeco de 60 kilograma simio estis 200 cm³. La grandeco de la plej unua prahomo antaŭ 2.5 milionoj da jaro estis 600 cm³, kaj la modernaj homoj havas 1200-1400 cm³-an cerbon.

12 Harari: Sapiens, paĝo 21.

13 Harari: Sapiens, paĝo 27.

Profesoro Harari skribis, ke „*Tute ne estas dioj en la universo, nek nacioj, nek mono, nek homaj rajtoj, nek leĝo, nek justeco. Ili ekzistas nur en la komuna imago de la homaro.*”¹⁴ Ĉar miliardoj da homoj kredis tiujn fikciojn, tiel ili kapablis kune agadi kaj fari

- Agrikulturan Revolucion por produkti pli da manĝaĵo;
- Industrian Revolucion por produkti efike multnombrajn industriajn produktaĵojn;
- Sciencan Revolucion por doni eternan vivon al la homaro.¹⁵ Surbaze de multdisciplinaj sciencaj esploroj usonanoj konstruktis la unuan atombombon en 1945, kaj ekde tiam homoj havas la kapablon detru la vivkondiĉojn sur la Terglobo kaj fini la homan historion. La granda demando en tiu situacio estas: „*Kio povos okazi en la estonto?*”

Estas paradokso, ke laŭ la teorio de Harari la uzo de unika homa lingvo ebligis, ke la homaro formu grandegajn grupojn (naciojn, landojn, religiajn organizojn, ktp.) kaj kunagadu flekseble kaj multnombre. Tiel homo sapiens povis okupi ĉiujn teritoriojn kaj konkeri la Terglobon dum sepdek mil jaroj. El tiu vidpunkto oni povas konkludi, ke la uzo de unika homa lingvo helpis la homan evoluon.

Sed aliflanke ni scias, ke lingvaj diferencoj kaŭzis terurajn militojn kaj bataladojn dum la lastaj jardekmiloj, kie multaj centmilionoj (aŭ pli ol miliardo) da homoj estis mortigitaj. Kaj ĉiuj aliaj homaj specioj (kiuj laŭ la teorio de Harari ne parolis fikciajn lingvojn) estis malaperigitaj. El tiu vidpunkto la uzo de niaj unikaj homaj lingvoj kaŭzis mortojn kaj suferojn de multcent milionoj da homoj kaj pro tio estiĝis gravaj ekologiaj katastrofoj.

Dum la XIX-a jarcento Ludoviko Zamenhof inventis facile lerneblan, neŭtralan internacian lingvon, kies nomo estas Esperanto. Lia celo estis helpi la homaron paroli komunan pontolingvon kaj tiel solvi la komunikadan problemon de la mondo. Dum la venontaj sesioj de nia prelegserio ni trarigardos la lingvajn evoluojn sur nia planeto kaj

14 Harari: SAPIENS, paĝo 31

15 Harari: SAPIENS, paĝo 298.

analizoj: ĉu estos ŝanco, ke en la estonto la revo de Zamenhof realiĝu. Do, ni malkovros la kondiĉojn, por ke Esperanto povu esti ĝenerale akceptata komuna pontolingvo en la internacia komunikado helpante konstrui pli pacan, harmonian kaj amikecan mondon.

Unue ni esploros la plej gravajn historiajn eventojn kaj iliajn lingvajn sekvojn kaj ni konkludos, ke laŭ multmiljaraj historiaj spertoj en nia nuna tempo tute ne ŝajnas esti ŝanco, ke la revo de Zamenhof realiĝu. Ni vidos, ke cent tridek jarojn post la kreo de nia lingvo, Esperanto ne povis fariĝi komuna pontolingvo de la mondo, sed la angla lingvo (kion parolas pli ol unu miliardo da homoj en la mondo) jam komencas plenumi la rolon de komuna internacia pontolingvo.

Poste ni parolos pri la nuntempa migrado en Eŭropon kaj trarigardos la lingvajn sekvojn de tiu evento. Kaj fine, laŭ miaj personaj spertoj ni vidos, ke malgraŭ la malesperaj nunaj mondkondiĉoj tamen povos esti ŝanco al la ĝenerala akcepto de Esperanto, kvankam nun ankoraŭ ne eblas antaŭvidi, kiam tio povos okazi.



Podio de la Argentina Universala Kongreso de Esperanto - Laŭ nova teorio homaro komencis rapide evoluiĝi kaj konstrui homan kulturon pro uzo de fikcia lingvo antaŭ 70 mil jaroj. Dume, diverslingveco kaŭzis terurajn bataladojn kaj militojn dum jarmiloj. Estas demando: ĉu per uzo de komuna pontolingvo la homaj rilatoj povos pliamikiĝi kaj la mondo povos pliboniĝi?

LA PLEJ GRAVAJ HISTORIAJ EVENTOJ KAJ ILIAJ LINGVAJ SEKVOJ

Laŭ la *Linguistic Society of America* la homaro parolis 6909 lingvojn sur la Terglobo¹⁶ en 2009, kaj inter tiuj lingvoj estis kelkaj, kiujn nur dekoj aŭ centoj da homoj komprenis. Laŭ aliaj kalkulmetodoj nun estas iom pli ol sep mil lingvoj, sed triono de ili estas malofte uzataj. Tio signifas, ke estas pli-malpli 2300 lingvoj, kiujn nur malpli ol unu mil homoj komprenas.

Ĉiusemajne malaperas du lingvoj, ĉar mortas la lasta homo, kiu povas kompreni tiun lingvon. Laŭ analizo de *National Geographic* ĝis la venonta jarcento inter 50% kaj 90% de la nune parolataj lingvoj malaperos¹⁷, kaj tiel nia universala homa kulturo neeviteble malriĉiĝos kaj malkoloriĝos. Kaj samtempe kelkaj lingvoj plifortiĝos, kutime la lingvoj, kiuj estas uzataj en la plej agresemaj landoj de la mondo. Laŭ la teorio de Charles Darwin kaj Christian de Duve ni scias, ke estas forta batalado por vivo, kie la plej agresemaj vivaĵoj havas ŝancon pluvivi, la aliuloj formortas kaj malaperas. Okazas simile ankaŭ en la historio de lingvoj.

Laŭ la *Nationalencyklopedin* la plej ofte uzataj gepatraj lingvoj de la mondo¹⁸ en 2010 estis la venontaj. (Vidu la rankon, la lingvon, la la nombron de parolantoj en milionoj kaj la procentaĵon.)

Ranko	Lingvo	Parolantoj	Procento
1.	Mandarina ĉino	955	14.1
2.	Hispana	405	5.85

16 <https://www.linguisticsociety.org/content/how-many-languages-are-there-world>

17 <https://news.nationalgeographic.com/2018/04/saving-dying-disappearing-languages-wikitongues-culture/>

18 https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_languages_by_number_of_native_speakers

3.	Angla	360	5.52
4.	Hinda	310	4.46
5.	Araba	295	4.23
6.	Portugala	215	3.08
7.	Bengala	205	3.08
8.	Rusa	155	2.42
9.	Japana	125	1.92
10.	Panĵaba	100	1.44
11.	Germana	95	1.39

Laŭ tiu listo multaj homoj povas surpriziĝi, vidante ke la Angla lingvo relative ne estas ofte uzata, kvankam vojaĝemuloj ofte spertas, ke la Angla lingvo estas rigardate kiel mondlingvo preskaŭ ĉie sur nia Terglobo. La kialo estas, ke la plejmulto de angleparolantoj uzas tiun lingvon kiel duan lingvon, do la Angla ne estas ilia gepatra lingvo.

Por trarigardi kiom da homoj parolas la plej ofte uzatajn lingvojn tute, ni rigardu la venontan liston.¹⁹ Vidu: la tutan rankon, la lingvon, la nombron de parolantoj, kiuj uzas la lingvon kiel gepatra lingvo, la rankon de la lingvo en la gepatra lingva listo, la nombron de parolantoj, kiuj uzas la lingvon kiel dua lingvo, la rankon de la lingvo en la dua lingva listo, kaj la tutan nombron de homoj kiuj parolas la lingvon (en milionoj).

TR	Lingvo	L1	L1R	L2	L2R	Tuta nombro
1.	Angla	378.2	3.	743.5	1	1,121
2.	Mandarina	908.7	1.	198.4	5.	1,107
3.	Hinda	260	4.	274.2	2.	534.2
4.	Hispana	442.3	2.	70.6	9.	512.9

19 https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_languages_by_total_number_of_speakers

5.	Stand. Araba	0.	5.	315	6.	315.
6.	Franca	76.7	16	208.1	3.	284.9
7.	Malaja	77	15.	204	4.	281
8.	Rusa	153.9	8.	110.4	7.	264.3
9.	Bengala	242.6	6.	19.2	14.	261.8
10.	Portugala	222.7	7.	13.8	15	236.5
11.	Urdu	69.2	24.	94.1	8.	163.2

Rigardante la listojn tuj videblas, ke la germana kaj japana lingvoj ne troviĝas en la pinto inter la unuaj 11 rankoj, ĉar nur malmultaj homoj uzas ilin kiel duan lingvon. Kaj evidentiĝas, ke plej ofte tiuj lingvoj estas la plej ofte uzataj, kiujn la plej grandaj imperioj disvastigis (ofte per forto kaj potenco) dum la homa historio. Pro tio indas trarigardi la plej grandajn imperiojn kiuj kontrolis la plej grandajn teritoriojn dum la homa historio. En la venonta tabelo ni vidos la dek du plej grandajn mondimperiojn²⁰, iliajn plej grandajn teritoriojn en milionoj da kvadratkilometroj, la procenton de kontrolita mondteritorio kaj la jaron kiam ili kontrolis tiun grandan mondparton.

Nomo de Imperio	Teritorio	Monda %	Jaro
Brita Imperio	35.5	23.84	1920
Mongola Imperio	24.0	16.11	1270, 1309
Rusa Imperio	22.8	15.31	1895
Hispana Imperio	13.7-20.0	- 13.43	1810, 1750
Qing Dinastia Ĉinio	13.1-14.7	- 9.87	1790
2-a Franca Kolonia Imperio	11.5	7.72	1920
Abbasida Kaliflando	11.1	7.45	750
Umayyada Kaliflando	11.1	7.45	720

²⁰ https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_largest_empires

Yuan Dinastia Ĉinio	11.0-13.72	- 9.21	1310, 1330
Xiongnu Imperio	9.0	6.04	176 Ant. Kr.
Brazila (Portugala) Imperio	8.337	5.6	1889
Japana Imperio	7.4-8.5	- 3.285	1938, 1942

Analizante ĉi-tiujn tabelojn oni povas konkludi jene:

1. Dum la homa historio la Brita Imperio estis la plej granda, kaj sekve de tio la angla lingvo estiĝis la plej multnombre parolata lingvo. Kiam Britio kontrolis pli-malpli kvaronon de la mondo, tiam oni per forto aŭ per avantaĝoj atingis, ke la angla lingvo estu oficiala lingvo en multegaj landoj. Pro tio okazis multegaj homaj tragedioj, ekzemple en Aŭstralio la registaro per forto ordonis, ke la lokaj indiĝenaj homoj ne povu zorgi siajn infanojn en siaj familioj, sed ordonis, ke la infanoj vivu en angle parolantaj enmigrantaj familioj. Signife helpis la disvasigon de angla lingvo, ke post la unua mondmilito la angle parolanta Usono estiĝis (ekonomie, finance kaj milite) la plej forta lando de la mondo kaj post la dua mondmilito Usono estiĝis superpotenco.
2. Kvankam multaj homoj pensas, ke ankaŭ la antikva Romia Imperio devas esti en la listo de la dek plej grandaj imperioj en la mondo, tamen tio ne estas tiel. Homoj pensas tion, ĉar estis tempo, kiam la Romia Imperio estis la plej forta imperio en Eŭropo, kiu okupis vastajn teritoriojn ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en Afriko kaj Azio. Fakte la teritorio de la Romia Imperio estis nur 5 milionoj da kvadratkilometra, do estis multegaj pli grandaj imperioj ol ĝi dum la mondhistorio. Malgraŭ tiu fakto ankaŭ la Romia Imperio havis signifan efikon al la disvastigo de sia lingvo pro tri kialoj.
 - La ekzisto de la imperio estis longdaŭra, ili kontrolis grandan parton de la tiama konata mondo dum pli ol mil kvar cent jaroj.

- Ili ordonis ke kristanismo estu oficiala religio en la imperio kaj tiel en ĉiuj landoj aŭ provincoj de la imperio oni uzis latinan (kaj antikvan grekan en la orienta parto de la imperio) lingvon en la religia kaj scienca vivo kaj ankaŭ en la publika administrado. Tiel povis okazi ekzemple, ke en mia lando, en Hungario latina lingvo estis la oficiala lingvo ĝis la deknaŭa jarcento.
 - La tria kialo estas, ke multaj neolatinaj landoj (ekz. Francio, Hispanio, Portugalio kaj Italio), kiuj iam estis partoj de la Romia Imperio ekonomie, finance kaj militite plifortiĝis dum la mezepoko, kaj tiel ili povis koloniigi vastajn teritoriojn de la mondo. Sekve de tio okazis, ke Sud-Ameriko estiĝis hispanlingva, Brazilio estiĝis portugallingva kaj multaj teritorioj en Afriko, Azio kaj en Nord-Ameriko estiĝis franclingvaj.
3. Necesas vidi, ke ordono al amaso de homoj ke ili estu parto de granda imperio kaj forlasu hejmlokojn, familianojn kaj ŝanĝu lingvojn kaj kulturon kaŭzis terurajn homajn tragediojn. Ni vidis en la tabeloj, ke la anglalingva Brita Imperio estiĝis la plej granda en la mondhistorio kaj Britio estiĝis nekredible riĉa kaj Usono fariĝis superpotenco. Sed necesas vidi ankaŭ la fakton ke tiu evoluo kaŭzis detruon kaj pepreon de multaj popoloj kaj kulturoj kaj mortigojn de milionoj da homoj. Tony Blair brita ĉefministro konfesis tion²¹ en la 27 Novembro numero de „*New Nation*” en 2006, kiam li diris: „*Britain's rise to global pre-eminence was partially dependent on a system of colonial slave labour ... The transatlantic slave trade stands as one of the most inhuman enterprises in history... 12 million were transported (and) some three million died.*” (La evoluo de Britio, kies rezulto estis, ke ĝi fariĝis globala potenco en la mondo, parte dependis de la laboro de sklavo en la kolonioj... La transatlantika sklavkomerco estis

21 http://www.ligali.org/truth2007/learning/tony_blair_statement_of_sorrow_new_nation_27_nov_06.pdf

unu el la plej kruelaj agadoj en la historio... 12 milionoj da homoj estis transportitaj kaj 3 milionoj mortis.)

4. Krom tiuj tragedioj la konstruo de grandaj imperioj okazigis ankaŭ aliajn tragediojn, kiuj estis eĉ pli kruelaj. La organizantoj de la imperioj celis konstrui multkulturajn sociojn en la imperioj kaj intencis ŝanĝi la loĝantaron. Kadre de tio ili organizis, ke (krom la afrikaj sklavoj) multnombraj eŭropanoj enmigradu en la koloniojn kaj tio kaŭzis pereon de la loka loĝantaro kaj detruon de ilia kulturo kaj malaperigon de iliaj lingvoj. Tiel malaperis miloj da lingvoj en Ameriko, Afriko kaj Aŭstralio kaj formortis multegaj popoloj. Antaŭ nelonge okazis ekzemple, ke mortis la lasta plensanga tasmaniano en Oceanio.
5. En la tabelo de mondimperioj la Mongola Imperio estas la dua plej granda (post la brita), kaj ankaŭ ili detruis multajn teritoriojn kaj kulturojn. En tiu tempo hungaroj vivis en du lokoj. Sep hungaraj triboj alvenis el Centra Azio al la nuna teritorio de Hungario kaj tie ili fondis reĝlandon. Aliaj triboj restis en Centra Azio kaj vivis en lando nomita „*Granda Hungario*”. Kiam la mongoloj invadis grandajn teritoriojn, tiam ili detruis la Hungaran Reĝlandon en Eŭropo, kaj pereis Grandan Hungaron. Sekve de tio la popoloj de Granda Hungario malaperis, eble kune kun aliaj popoloj. Kvankam ankaŭ la Mongola Imperio estis grandega kaj kontrolis vastan teritorion, tamen ili ne sukcesis atingi, ke la mongola lingvo estu vaste uzata. Ĉar la ekzisto de tiu imperio estis nur mallongdaŭra, do ili ne havis tempon disvastigi la uzadon de siaj lingvoj.
6. Laŭ la antaŭa trarigardo ni povas konkludi, ke la vasta aŭ malvasta uzado de lingvoj dependas nek de la natura evoluo de lingvoj, nek de la beleco, utileco aŭ taŭgeco de lingvoj. Sed imperiestroj, militistaj kaj politikaj potencoj decidas, kiuj lingvoj estu uzataj en siaj imperioj. Kiel ni vidis en la tabelo, nun pli ol unu miliardo kaj cent milionoj da homoj pa-

rolas angle kaj pli ol sep cent milionoj uzas anglan kiel duan lingvon. Laŭ taksadoj nuntempe pli ol unu miliardoj da homoj lernas tiun lingvon, do ni povas konkludi, ke en nia epoko la angla lingvo estiĝis la ĝenerale akceptata internacia pontolingvo en la mondo. Antaŭ pli ol cent jaroj Zamenhof konstruis facile lerneblan neŭtralan lingvon, esperanton kaj li revis, ke iam tiu lingvo estos la internacia pontolingvo inter diverslingvaj homoj. Nun jam evidentiĝas, ke tiu revo tute ne estas reala, ĉar kvankam la ideo de Zamenhof estas logika, kiel slogano diras: „*armiloj kaj mono pli laŭte parolas ol logiko*”.

7. Laŭ la menciita tabelo nun 2.2513 homoj, do pli ol du miliardoj kaj 250 milionoj da homoj uzas la dek unu plej ofte uzatajn lingvojn, kiel duan lingvon en sia internacia komunikado. Tio signifas, ke laŭ la nuna monda lingvoeduka sistemo pli ol 2.5 miliardoj da homoj ellernis duan lingvon, tamen tio tute ne solvis la komunikadan problemon de la mondo. La plej gravaj problemoj de la nuna lingvoeduka sistemo estas, ke
 - tio tute ne povas solvi la komunikadan problemon de la mondo, ĉar diverslingvaj homoj lernas ne la saman komunan pontolingvon, sed diversajn lingvojn, kiel ni vidis, la anglan, mandarinan, hindan, hispanan, ktp. Mi persone spertis en Sud-Ameriko, ke per angla lingvo estis ege malfacile komunikiĝi, ĉar preskaŭ ĉie oni parolis nur hispane. Similajn spertojn mi havis en Meza Azio (Mongolio, Kazakio, ktp.), kie rusa estis la internacia komuna pontolingvo.
 - Alia problemo de la nuna monda lingvoeduka sistemo estas, ke ĝi estas tro multekosta. Laŭ taksado homo povas ellerni esperanton dum 300 horoj (pro ĝia facileco kaj simpla gramatiko), sed ellerni aliajn naciajn lingvojn (ekz. anglan, ĉinan, ktp.) oni bezonas 3000 horojn. Tio signifas, ke se ĉiuj homoj ellernus esperanton, ĉiuj homoj povus ŝpari pagi por 2700 lecionoj. En mia lando unu leciono kostas 4 eŭrojn, en riĉaj landoj, ĝi estus eble pli multekosta, en malriĉaj landoj

eble pli malmultekosta. (Kiam oni kalkulas la tempobezonon de lingvolernado, tiam oni kalkulas ne nur la tempon dum la kursoj en lernejoj, sed ankaŭ la tempon de memlernado hejme.) Sekve de tio ĉiuj homoj povus ŝpari $2700 \cdot 4 = 10,800$ eŭrojn, se ĉiuj homoj ellernus esperanton, kiel komunan pontolingvon, sen la naciaj pontolingvoj. Tio signifas, ke la mondo (en nia kazo la menciitaj 2.5 miliardoj da homoj) povus ŝpari $2,500,000,000 \cdot 10,800$ eŭrojn en tiu kazo. (Tio estas 25 bilionoj (laŭ la angla sistemo trilionoj) da eŭroj. Per tiu mono la mondo povus efike malaperigi la netolereblan malriĉecon kaj solvi aliajn gravajn sociajn problemojn en nia Terglobo.

- Alia problemo de la nuna internacia komunikado estas, ke tio tute ne estas justa, ĉar la nune uzataj internaciaj pontolingvoj (angla, hinda, mandarina, hispana, rusa, ktp.) ne estas neŭtraj. Ĉar multaj homoj uzas ilin kiel siaj gepatraj lingvoj, pro tio ili havas maljustajn avantaĝojn kaj privilegiojn en la internacia komunikado.

Malgraŭ tiuj problemoj nek nun, nek en la proksima estonto ŝajnas aŭ ŝajnos esti reala ŝanco enkonduki la globalan instruadon kaj uzadon de Esperanto en la internacia komunikado, ĉar la interesoj de superpotencoj kaj mondpotencoj kaj grandaj imperioj estas malsamaj. Kaj estas kompreneble, ke ili tute ne emas voĉdoni kontraŭ siaj interesoj en internaciaj decidopovaj organizoj, ekzemple en UN aŭ en UNESCO.



Pro multnombriĝo de homaro, la naturo signife ŝanĝiĝis: grandaj nuboskrapuloj konstruiĝis por loĝigi sep miliardojn da homoj. (La foton faris la Aŭtoro en Ĉinio.)

ENMIGRADO EN EŬROPON KAJ LA EŬROPA DILEMO

Nuntempe la migrado kaŭzas la plej gravan socian krizon en la Eŭropa Unio. Kiam mi prelegis pri tiu temo en Orienta Azio²², tie la aŭskultantoj ne povis kompreni kion ili vidis en televidiloj, ke en Eŭropo centmiloj da nekonataj homoj promenadis el lando al alia lando en arbaroj dum noktoj sen iu ajna landlimgarda aŭ dogana kontrolo.

Se oni legas ĵurnalajn artikolojn pri tiu temo, tiam oni povas konstati, ke tute malsamaj konkludoj troviĝas en diversaj organoj rilate al la temo de internacia migrado. Kelkaj ĵurnaloj klarigas, ke London kaj Rotterdam jam havas muslimajn urbestrojn kaj skribas, ke pli ol duono de la infanoj, kiuj naskiĝis en Nederlando kaj Belgio jam apartenas al la islama religio. Kaj ili supozas, ke post 30-35 jaroj en tiuj landoj muslimoj estos la plimulto en la socio kaj la socio de blankuloj baldaŭ finiĝos en Eŭropo.

Sed en aliaj organoj oni publikas tute malsimilajn artikolojn pri tiu temo. En tiuj artikoj la verkistoj klarigas, ke pro manko de naskoj en Eŭropo estas risko, ke la eŭropa loĝantaro baldaŭ malmultnombriĝos kaj tio havos negativan efikon al la ekonomia evoluo. Pro tio ili opinias, ke nur multnombra enmigrado povas solvi tiun problemon, do nepre necesas kuraĝigi amason da homoj en Afriko kaj Azio, ke ili migradu en Eŭropon.

En la venontaj ĉapitroj mi parolos pri tiu dilemo ne laŭ subjektivaj impresoj, sed mi provos prognozi la estonton per objektiva kaj neŭtrala matematika-demografia modelo. En tiu analizo mi uzos la internaciajn statistikajn datumojn de UNO kaj UNESCO kaj baziĝos sur la raportaĵojn de Monda Banko rilate al tiu temo.

22 La Aŭtoro prelegis pri tio orogene en la Hankuk University of Foreign Studies en Seoul en Suda Koreio.

La matematika modelo de demografiaj ŝanĝoj

Laaŭ diversaj demografiaj statistikaj enketoj la kresko aaŭ malkresko de loĝantaro signife malsamas en la landoj de Eaŭropo, Azio kaj Afriko. Multaj organoj, ekzemple la angla Guardian skribas²³, ke la proporcio de enmigrintoj estas 6% de la tuta loĝantaro en Britio kaj la nombro de enmigrintoj kreskas je 2-3% jare. Sed la nombro de la origina loĝantaro estas senŝanĝanta, do ili nek kreskas, nek malkreskas. Se ni ekstrapolas ĉi tiujn datumojn, tiam ni povas kalkuli per matematika modelo la proporcion de enmigrintoj kaj origina loĝantaro dum la venontaj jaroj.

Ni uzu la venontajn datumojn:

a_0 = la nombro de origina loĝantaro je la tempo de kalkulo

b_0 = la nombro de enmigrintoj je la tempo de kalkulo (komence)

k = la proporcio de origina popolo kaj enmigrintoj komence

p_a = la kreska procento de origina popolo jare

p_b = la kreska procento de enmigrintoj jare

$a(n)$ = la nombro de origina popolo post n jaroj

$b(n)$ = la nombro de enmigrintoj post n jaroj

$y(n)$ = la proporcio de origina popolo post n jaroj

$w(n)$ = la proporcio de enmigrintoj post n jaroj, kie

y kaj w signifas la proporciojn rilate al la tuta loĝantaro. En tiu kazo la rilatoj inter la datumoj estas la venontaj:

$$k = a_0 / b_0$$

$$a(n) = a_0 * (1 + p_a / 100)^n$$

$$b(n) = b_0 * (1 + p_b / 100)^n$$

$$y(n) = 100 * a_0 * (1 + p_a / 100)^n / (a_0 * (1 + p_a / 100)^n + b_0 * (1 + p_b / 100)^n)$$

$$y(n) = 100 * k * b_0 * (1 + p_a / 100)^n / (k * b_0 * (1 + p_a / 100)^n + b_0 * (1 + p_b / 100)^n)$$

$$y(n) = 100 * k * (1 + p_a / 100)^n / (k * (1 + p_a / 100)^n + (1 + p_b / 100)^n)$$

$$w(n) = 100 * b_0 * (1 + p_b / 100)^n / (a_0 * (1 + p_a / 100)^n + b_0 * (1 + p_b / 100)^n)$$

23 <https://www.theguardian.com/uk/2000/sep/03/race.world>

$$w(n)=100*b_0*(1+p_b/100)^n/(k*b_0*(1+p_a/100)^n+b_0*(1+p_b/100)^n)$$

$$w(n)=100*(1+p_b/100)^n/(k*(1+p_a/100)^n+(1+p_b/100)^n)$$

En kazo de Britio laŭ la menciitaj fontoj $k=15,667$, $p_a=0$ kaj $p_b=2,5$. Sekve de tio - se ĉiuj kondiĉoj estos sensanĝantaj – la geografiaj datumoj de la lando estos la venontaj:

Post tiom da jaroj	Proporcio % de origina popolo en la tuta loĝantaro	Proporcio de enmigrintoj en la tuta loĝantaro
Komence	94	6
10	92.446431159	7.553568841
20	90.5311204758	9.4688795242
40	85.3688795785	14.6311204215
60	78.073908095	21.926091905
80	68.4844648862	31.5155351138
100	57.0103655391	42.9896344609
111	50.2663808994	49.7336191006
112	49.6490738673	50.3509261327
120	44.7301896662	55.2698103338
140	33.060933356	66.939066644

Tio montras, ke post 112 jaroj la proporcio de origina popolo estos malpli ol duono de la tuta loĝantaro kaj post cent kvardek jaroj jam pli ol du trionoj de la popolo estos enmigrintoj aŭ iliaj idoj. Tiu procezo similas al la popolsanĝo en Aŭstralio kaj Ameriko, post kiam eŭropanoj okupis tiujn terenojn kaj amase enmigris en tiuj landojn aŭ amase veturigis afrikajn sklavojn al tiuj teritorioj.

Kiam eŭropanoj malkovris Aŭstralion kaj Amerikon, tiam 100% de ilia loĝantaro estis indianoj kaj indiĝenaj tribanoj. Sed pro enmigrado, pereigo de la origina loĝantaro, perforta veturigo de sklavo kaj krimuloj al tiuj landoj kaj pro la popolkreskaj diferencoj nun nur 1% de la usona loĝantaro apartenas al la indianoj²⁴. Kaj nur 5% de la

24 <http://www.kff.org/other/state-indicator/distribution-by-raceethnicity/?currentTimeframe=0&sortModel=%7B%22colId%22:%22Location%22,%22sort%22:%22asc%22%7D>

nuna aŭstralia loĝantaro estas indiĝenaj popoloj²⁵. Multaj popoloj (kaj lingvoj kaj kulturoj) tute malaperis, ekzemple antaŭ kelkaj jardekoj formortis la lasta tasmaniano.

Nia uzata matematika modelo prognozas reale la tendencojn de demografiaj ŝanĝoj, se oni supozas, ke la nunaj kreskaj procentoj de origina loĝantaro kaj enmigrantoj estos la samaj dum la tuta analizata tempo. Sed kelkaj eventoj povas plirapidigi la malkreskon de procento de origina loĝantaro kaj kelkaj aliaj eventoj povas signife plimalrapidigi tiun procezon.

- Laŭ la menciitaj fontoj la nombro de origina loĝantaro estas konstanta (senŝanĝanta) en Britio, sed povos okazi, ke la kreska procento de tiu socia grupo signife malmultnombriĝos. Laŭ demografiaj analizoj la nombro de loĝantaro estas senŝanĝanta, se averaĝe 2.1 infanoj naskiĝas en familio. Sed oni povas reale supozi, ke tio malmultnombriĝos, ĉar la kreska proporcio en multaj landoj, ekzemple en Hungario²⁶ estas nur 1.4. Kaj laŭ mondbankaj statistikoj ankaŭ en Germanio spertebblas simila fenomeno²⁷, sed en Afriko ofte okazas, ke familioj havas averaĝe 4 infanojn, eĉ pli. Se tiu fenomeno okazus en Britio (kaj ankaŭ en aliaj Okcident-eŭropaj landoj), tiam povus okazi, ke la proporcio de enmigrantoj kaj iliaj idoj fariĝos pli ol 50% de la landa loĝantaro pli frue.
- Kelkaj politikistoj opinias, ke miksi popolojn kaj rasojn kaj naciojn estas utila kaj ili subtenas, ke tiu miksiĝo rapide okazu. Ekzemple Yves Cochet, membro de la franca registaro proponis, ke francaj virinoj nasku malpli da infanoj por ke estu pli da lokoj en Francio por afrikaj kaj aziaj enmigrantoj.²⁸ Se la socio akceptas tian proponon, tiam la demografia situacio pli rapide ŝanĝiĝos kaj la enmigrantoj havos pli ol duonon de la socio pli frue.

25 http://www.indexmundi.com/australia/demographics_profile.html

26 http://www.ksh.hu/pls/ksh/docs/hun/xstadat/xstadat_hosszu/h_wdsd001b.html

27 <http://data.worldbank.org/indicator/SP.DYN.TFRT.IN>

28 <https://www.marianne.net/politique/pour-protoger-l-environnement-l-ex-ministre-yves-cochet-prone-la-suppression-des>

- Teorie oni povas supozi, ke familioj de origina loĝantaro emos naski pli da infanoj, sed laŭ mondbankaj statistikoj tiu supozo ne estas reala. Male, la malmultnombriĝo de origina loĝantaro estas ĝenerala tendenco en Eŭropo. Laŭ demografi-aj enketoj 40% de germanaj virinoj ne emas naski infanojn.
- Kelkaj socisciencistoj opinias, ke la enmigrantoj al kutimiĝos al la eŭropaj kutimoj kaj ankaŭ ili naskos malpli da infanoj en la estonto. Kaj multaj homoj el ili rapide asimiliĝos. Se tio okazus, tiam la proporcio de enmigrantoj pli malfrue estos pli granda ol la proporcio de origina loĝantaro. Aliaj socisciencistoj atentigas, ke la konservo de religia, kultura kaj etna identeco estas tre grava en la enmigrantoj, ekzemple la islama religio serioze malpermesas, ke islamanoj forlasu sian religion. Antaŭ kelkaj jaroj la estro de la turka komunumo en Germanio asertis, ke la asimilado estas peko.
- Multaj islamanaj politikaj kaj religiaj estroj opinias, ke islamanoj havas taskon multnombriĝi kaj fariĝi plimulto en diversaj socioj. Ekzemple Arafat, iama palestina estro asertis, ke la plej grava armilo de palestinoj estas la utero de palestinaj virinoj. Li kuraĝogis sian popolon, ke ili nasku pli da infanoj ol la judoj kaj tiel ili povos fariĝi plimulto en Israelo iam en la estonto.
- Kadhafi, la estro de Libio havis similajn pensojn, kiam li diris: *“We have 50 million Muslims in Europe. There are signs that Allah will grant Islam victory in Europe – without swords, without guns, without conquests. The 50 million Muslims of Europe will turn it into a Muslim continent within a few decades.”* (Nuntempe kvindek milionoj da islamanoj vivas en Eŭropo. Estas signoj, kiuj montras, ke Allah helpas, ke islamanoj konkeru en Eŭropo – sen glavoj, sen armiloj kaj sen militoj. Tiuj kvindek milionoj da homoj ŝanĝos Eŭropon kaj kreos islaman kontinenton tie dum kelkaj jardekoj.)²⁹ Se la enmigrantoj en Eŭropo obeas tiujn konsilojn, tiam enmig-

29 <http://www.wnd.com/2006/05/35992/>

rantoj estiĝos plimulto en kelkaj eŭropaj landoj pli frue ol laŭ la prognozo de nia matematika modelo.

- Nia konkludo povas esti malsama, se ni analizas la procezojn ne statike sed dinamike, rigardante, ke la sociaj kutimoj dinamike ŝanĝiĝas de tempo al tempo. Laŭ raporto de Population Reference Bureau³⁰ islamanaj virinoj en Okcidenta Germanio naskis pli da infanoj ol neislamaninoj. La diferenco en 1970 estis du infanoj, sed en 1996 nur unu infano. Se tiu fenomeno montros ĝeneralan tendencon en tuta Eŭropo, tiam la prognozo de prezidanto Kadhafi ne efektivigiĝos dum la venontaj jardekoj, do Eŭropo ne estiĝos islama kontinento en la antaŭvidebla estonto.
- Kvankam la tuta Eŭropo eble ne estos islama kontinento en la antaŭvidebla estonto, tamen en kelkaj landoj kaj regionoj estas reala ŝanco, ke islamanoj estu la plimulto en la socio. Tio okazis ekzemple en Kosovo, kiu estis iam la nesto de serba popolo. Parte pro pli rapida multnombriĝo de islamanaj albanoj en tiu loko, parte pro signifa enmigrado, islamanoj estiĝis la plimulto antaŭ kelkaj jardekoj kaj ili havis deziron sendependiĝi de Serbio kaj de iama Jugoslavio. La sekvo estas konata, estiĝis kruela milito kaj je la fino Kosovo sendependiĝis. Malgraŭ la fakto ke multaj landoj ankoraŭ ne emas akcepti tiun situacion.
- Krom Kosovo, ankaŭ en aliaj okcident-eŭropaj landoj oni supozas, ke baldaŭ povos okazi, ke islamanoj atingos plimulton post kelkaj jardekoj. Oni povas legi en la interreto ekzemple ke en Nederlando, kie la nuntempa proporcio de islamanoj estas nur 5%, tamen pli ol 50% de la nentempe naskitaj infanoj apartenas al islamanaj familioj.³¹ Laŭ mi tiu aserto ne estas reala, nia matematika-demografia modelo montras alian konkludon. Krome, necesas memori, ke en Nederlando (simi-

30 <http://www.prb.org/Publications/Articles/2008/muslimsineurope.aspx>

31 <http://religionresearch.org/closer/2009/05/05/islamizing-europe-muslim-demographics/>

le al multaj aliaj eŭropaj landoj) oni ne registras religiojn de beboj, kiam ili naskiĝas. Mia tia konkludo kongruas kun la konkludoj de multaj eŭropaj sociosciencistaj organizoj kaj ankaŭ kun analizo de BBC³².

- Krom la menciita fenomeno, ke la enmigrantaj virinoj emas pli multnombre naski infanojn ol la virinoj de origina loĝantaro, alia grava afero estas, ke kelkaj eŭropaj landoj forte kuraĝigas afrikanojn kaj azianojn ke ili migradu en Eŭropon. Angela Merkel, estro de Germanio opiniis, ke en sia lando mankas laborforto kaj pro tio ŝi enkondukis politikon de „*Willkommenskultur*”, kio signifas, ke Germanio sen limigita nombro emas akcepti rifuĝintojn kiuj venas el landoj kie estas militoj, aŭ netolereblaj malbonaj vivkondiĉoj. Ĉar laŭ mondbanka statistiko³³ la mono, kiun homoj povas ricevi en Germanio estas dekoble (en kelkaj kazoj eĉ centoble) pli altaj ol la salajroj en Afriko kaj Sud-Azio, pro tio estas kompreneble, ke en 2015 pli ol unu miliono da enmigrantoj alvenis al Germanio el tiuj landoj. Se ankaŭ aliaj landoj enkondukas similajn politikojn, tiam la demografiaj ŝanĝoj en Eŭropo okazos pli rapide.
- Studante la homan historion ni scias, ke tre ofte en diversaj imperiaj centroj oni decidis, kiuj imperioj gvidu la vivon de diversaj popoloj kaj ili decidis, kiel diversaj popoloj translokiĝu el siaj hejmlandoj al aliaj landoj aŭ kontinentoj. Sekve de tio tiuj imperiaj centroj rapide riĉiĝis kaj aliaj teritorioj kaj iliaj loĝantaroj senespere malriĉiĝis. En alia parto de ĉi-tiu prelegserio mi detale parolas pri la evento, ke Britio konstruis la plej grandan mondimperion dum la homa historio kaj tiu imperio efike riĉiĝis per la transatlantika sklavkomerco.³⁴ Ankaŭ nuntempe estas tendencoj, ke internaciaj decidopovaj politikaj potencoj kuraĝigu migradon kaj ordonu landojn kaj popolojn ke ili akceptu enmigrantojn, eĉ se tiuj enmigrantoj

32 http://news.bbc.co.uk/2/hi/programmes/more_or_less/8189434.stm

33 <https://data.worldbank.org/indicator/NY.GDP.PCAP.CD>

34 <https://www.theguardian.com/politics/2006/nov/26/race.immigrationpolicy>

ne emas vivi en tiuj lokoj. Se tiuj potencoj sukcese povos agadi tiel, tiam la demografiaj ŝanĝoj okazos pli amase kaj pli rapide.

- Nuntempe tri gravaj internaciaj organizaĵoj opinias, ke popolmigrado estas utila kaj subteninda. Ili estas la UN Komisiono por Rifuĝintoj, la Eŭropa Komisiono kaj la Fonduso por Malfermita Socio de George Soros. „*The World Population Prospects: The 2017 Revision*”, oficiala UN publikaĵo asertas³⁵, ke inter 2005 kaj 2010 kvar kaj duonmilionoj da homoj migradis el malriĉaj landoj al riĉaj landoj jare³⁶, do en la analizata tempo pli ol kvardek miloj da homoj ŝanĝis hejmlukojn. George Soros finance subtenis tiun popolmigradon kaj proponis al la Eŭropa Unio ke oni akceptu unu milionon da rifuĝintoj jare.³⁷ Se la Eŭ membroŝtatoj akceptos tiun proponon, tiam la demografiaj ŝanĝoj en Eŭropo plirapidiĝos.
- Pro la senkontrola internacia migrado la publika sekureco malboniĝis en kelkaj Eŭ membroŝtatoj, kaj dum la lastaj jaroj enmigrantoj okazigis seriozajn teroratakojn en kelkaj landoj. Pro tio en Francio oni enkondukis „*staton de krizo*” (france: *état d'urgence*), kaj ankaŭ en aliaj eŭropaj landoj oni povas sperti, ke la polica kontrolo estiĝis pli ofta kaj atentema. Kvankam je la komenco Svedio forte subtenis la akcepton de multnombraj enmigrantoj, tamen poste oni konkludis, ke tio ne plu eblos, kaj la sveda vicĉefministro publike ekkriis en televida programo, kiam ŝi anoncis, ke sia lando ne plu povos akcepti multnombrajn enmigrantojn en la estonto.³⁸ Se pli

35 <http://www.un.org/sustainabledevelopment/blog/2017/06/world-population-projected-to-reach-9-8-billion-in-2050-and-11-2-billion-in-2100-says-un/>

36 Laŭjure estas diferenco inter migrantoj kaj rifuĝintoj, sed multaj organizaĵoj asertas, ke ambaŭ estas subtenindaj, tamen nur akcepto de rifuĝintoj estas ĝenerala devo laŭ internacia konsento

37 <https://www.economist.com/news/europe/21723678-hungarys-registry-foreign-funded-ngos-latest-step-its-march-illiberalism-viktor> és <http://www.express.co.uk/news/world/616541/European-Union-Migrants-Refugees-George-Soros-Hungary-Viktor-Orban-Europe>

38 <http://www.independent.co.uk/news/people/refugee-crisis-sweden-deputy->

multaj landoj konkludos simile, tiam la demografiaj ŝanĝoj en Eŭropo plimalrapidiĝos.

- Rilate al tiu temo George Soros aperigis artikolon en sia organo „*Project Syndicate*” la 26-an de Septembro, 2015, kies titolo estas „*Rebuilding the Asylum System*”³⁹. En tiu artikolo li proponis, ke oni donu al ĉiuj enmigrintoj 15 mil eŭrojn jare, do 30 mil eŭrojn dum la unuaj du jaroj por kovri iliajn kostojn (loĝado, manĝoj, edukado, ktp.)⁴⁰ Tio signifas, ke averaĝa afrika familio (du gepatroj kaj tri infanoj) ricevus 150,000.- eŭrojn, kio estas pli alta sumo, ol la sumo, kiun afrika homo povas gajni dum sia tuta vivo en multaj afrikaj landoj. Se la Eŭ membrandoj akceptus tiun proponon, tiam ili kuraĝigus amason de malriĉuloj de Afriko kaj Azio ke ili migradu en Eŭropon.

Interesoj de diversaj landoj kaj sociaj grupoj

Nuntempe estas akra diskutado rilate al la temo de internacia popolmigrado inter estroj de diversaj landoj, internaciaj organizoj kaj sociaj grupoj, ĉar tiuj grupoj havas malsamajn historiajn spertojn kaj malsamajn interesojn. Nun indas trarigardi la opiniojn de la plej gravaj sociaj grupoj kaj indas kompreni la kialojn: kial ili havas malsamajn konkludojn.

1. Laŭ UNICEF dudekdu mil infanoj mortas ĉiutage pro manko de manĝo, mizero kaj malriĉeco⁴¹. Tio signifas, ke pli-malpli ok milionoj da infanoj mortas jare sen necese en la mondo, ĉar la alte evoluitaj, riĉaj landoj ne havas kompaton kaj solidare-

prime-minister-cries-as-she-announces-u-turn-on-asylum-policy-a6749531.html

39 <https://www.project-syndicate.org/commentary/rebuilding-refugee-asylum-system-by-george-soros-2015-09>

40 <https://www.economist.com/news/europe/21723678-hungarys-registry-foreign-funded-ngos-latest-step-its-march-illiberalism-viktor> kaj <http://www.express.co.uk/news/world/616541/European-Union-Migrants-Refugees-George-Soros-Hungary-Viktor-Orban-Europe>

41 www.globalissues.org/article/26/poverty-facts-and-stats

con al ili. Pli ol unu miliardo da homoj ne povas akiri sufiĉe da akvo en la malriĉaj landoj kaj 330 milionoj el ili havas malpli ol unu dolaran enspezon tage. Du miliardoj kaj sescent milionoj da homoj ne povas akiri bazan medicinan servon kaj 385 milionoj el ili havas malpli ol unu dolaran enspezon tage. Ilia sorto estas senespera kaj el morala vidpunkto oni povas konkludi, ke la plej grava tasko de la riĉaj landoj kaj decidopovaj internaciaj organizoj devus esti savi la vivon de tiuj milionoj. Aŭ per dono al ili eblecon migradi en riĉajn landojn aŭ helpi ilin per rekta financa subteno. Tamen tio tute ne okazas pro senkompato kaj egoismo de la riĉaj landoj.

2. Nuntempe estas tre granda diferenco inter la riĉaj kaj malriĉaj landoj rilate al la malneta nacia produktaro kaj rilate al la salajronivelo. Laŭ mondbankaj statistikoj la malneta nacia produktaro estas pli-malpli 50 mil dolaroj jare en Okcidenta Eŭropo kaj estas multaj malriĉaj landoj, kie tio estas nur pli-malpli unu mil dolaroj. Sekve de tio multaj homoj en tiuj malriĉaj landoj kaj en teritorioj, kie la vivkondiĉoj estas mizeraj pro milito aŭ malbona klimato pensas, ke ili povus pli bone vivi, se ili translokiĝus al pli riĉaj landoj. Ni vidis, ke milionoj da homoj vivas en tiuj malriĉaj landoj, kiuj tute ne havas eblecon elmigradi, ĉar ili estas malsanaj, malfortaj kaj ilia enspezo estas malpli ol unu dolaro tage. Sed ankaŭ en tiuj landoj vivas sanaj, fortaj kaj iomete riĉaj homoj kiuj emas elmigradi, ĉar ili emas promenadi centojn aŭ milojn da kilometroj kaj ili kapablas pagi milojn da dolaroj por kovri vojaĝkostojn. Laŭ la oficiala hejmpaĝo de Eŭropol en 2015 homkont-rabandistoj gajnis monon inter tri kaj ses miliardoj da dolaroj por veturigi migrantojn el Azio kaj Afriko en Eŭropon.⁴² En tiu raporto ni povas legi, ke la kosto por veturigi enmigranton el Turklando al Italio estis 3,700.- dolaroj kaj el Libio al Italio estis 1000.- eŭroj. Rigardante la grandan diferencon inter la vivnivelo kaj publika sekureco en Afiko/Azio kaj Okcidenta

42 https://www.europol.europa.eu/sites/default/files/documents/migrant_smuggling_europol_report_2016.pdf

Eŭropo oni povas kompreni, ke milionoj da azianoj kaj afrikanoj klopodas migradi en Eŭropon, eĉ se ili riskas morti dum la longa vojaĝo

3. La lasta kvincentjara historio de Okcidenta kaj Orienta Eŭropo estis tute malsama, kaj pro tio tiuj landogrupoj havis tute malsamajn spertojn rilate al multikulturismo kaj kunvivado de diversaj nacioj kaj etnaj grupoj en la sama lando. Post la dekkvina jarcento diversaj okcident-eŭropaj landoj koloniigis preskaŭ la tutan mondon kaj tiel ili rapide riĉiĝis, sed dum la sama tempo mizeraj vivkondiĉoj estiĝis en la kolonioj. Dum multaj jarcentoj la kunvivado de blankuloj kaj nigruloj signifis, ke blankuloj uzis nigrulojn kiel sklavoĵoj aŭ laborigis ilin por malaltaj salajroj. La profito akumuligis en la okcident-eŭropaj imperiaj centroj. Post la dua mondmilito la situacio signife ŝanĝiĝis kaj la kolonioj sendependiĝis. Tamen la vivnivela diferenco inter la okcident-eŭropaj landoj kaj la iamaj kolonioj restis grandaj kaj pro naska malemo de okcident-eŭropaj virinoj mankis amaso de laborforto. Pro tio multaj okcident-eŭropaj landoj invitis amason da enmigrantoj el diversaj malriĉaj landoj por ke ili laboru tie por rekonstrui la postmilitan ekonomion. Tiel milionoj da turkaj gastlaboristoj aperis en Germanio kaj amaso de araboj en Francio, kaj sekve de tio estiĝis multikulturaj socioj en multaj okcident-eŭropaj landoj. Analizante tiun fenomenon oni povas konkludi, ke multaj okcident-eŭropaj landoj opinias nuntempe, ke enmigrado estas utila kaj bona, kaj pro tio ili kuraĝigas amason da afrikanoj kaj azianoj por translokiĝi en Eŭropon.
4. La Orient-Eŭropa sperto rilate la multikultura kaj multietna kunvivado estis malsama. Ni esperantistoj bone scias, ke Zamenhof vivis en urbo Bjalistok en la deknaŭa jarcento, kie rusa, pola, germana kaj juda kolonioj vivis kune, kaj tie ofte okazis konfliktoj kaj bataladoj inter la diversaj etnaj, religiaj kaj naciaj grupoj. Zamenhof pensis, ke per uzo de komuna pontolingvo eblus amikigi la interhomajn rilatojn, sed post pli ol cent jaroj ni povas konkludi, ke tio ne sukcesis. Dum la

lastaj pli ol cent jaroj okazis teruraj mondmilitoj, pro kio dekoj da milionoj da homoj mortis. Nun ni estas en la Baltikaj landoj kaj ni scias, ke dum jarcentoj la Germana kaj Rusa Imperioj bataladis por kontroli tiun teritorion. Sed dum la sama tempo la popoloj de tiu mondoparto ĉiam klopodis vivi sendepende, sen iu ajna imperia kontrolo, kaj ili intencis konservi siajn lingvon, kulturon, religion kaj tradicion. Tamen tio tre ofte ne sukcesis. Estis pogromoj kontraŭ judoj en la cara Ruslando kaj oni mortigis milionojn da judoj dum la tempo de la germana kontrolo. Orienta Pruslando tute malaperis sur la mapo kaj gravaj politikaj potencoj ordonis, ke milionoj da germanoj kaj poloj translokiĝu el sia hejmlando al alia teritorio. Dum la komunista epoko, kiam Sovetunio kontrolis tiun teritorion, tiam ankaŭ la kulturo signife ŝanĝiĝis. En Latvio eĉ la loĝantaro. Laŭ Vikipedio en 1989, je la fino de la Sovetunia kontrolo 1.4 milionoj da latvoj vivis en la lando kun 1 miliono da rusoj kaj 450 mil aliaj etnaj grupanoj. Antaŭ ne longe UN Asambleo akceptis internacian dokumenton rilate al migrado, kiu nomiĝas „*Global compact for migration*”. Rilate al tio multaj UN oficistoj kune kun membroj de Eŭropa Parlamento kaj Eŭropa Komisiono opinias, ke migrado estas utila kaj bona por ambaŭ la migrantoj kaj la landoj kiuj akceptas ilin. Sed Usono, Hungario, Aŭstralio kaj multaj aliaj landoj ne aliĝis al tiu internacia kontrakto, ĉar ili vidas ankaŭ negativajn efikojn de amasa migrado. La hungara ministro pri eksteraj rilatoj atentigis, ke „*migrado ne estas fundamenta homa rajto*.” Ĉi tie en la Baltiko ni povas facile kompreni, se migrado estus fundamenta homa rajto, tiam ekzemple kelkcent mil rusoj facile povus aperi en Latvio kiel enmigrantoj kaj ili dum mallonga tempo povus atingi plimulton de la loĝantaro. Kaj ni havis similajn spertojn ankaŭ en nia hungara historio. En la dek kvina jarcento Hungario estis forta eŭropa lando kaj Hungario havis pli multnombrian loĝantaron ol Anglio. Sed en la dekseka jarcento la islama Turklando okupis parton de Hungario kaj poste estiĝis cent kvindek jara milito

inter Turklando kaj Hungario. Dum tiu tempo hungaroj vivis en multkultura kaj multireligia imperio kaj je la fino de tiu epoko la lando serioze malfortiĝis. Kaj la hungara loĝantaro malmultnombriĝis. (Male, en la sama tempo Britio komencis konstrui mondimperion kaj sekve de tio ili sukcesis kontroli kvaronon de la tuta mondo.) Kiam la unuiĝintaj eŭropaj armeoj reokupis urbon Buda de la turkoj (Buda estas parto de Budapest kaj tio estis la ĉefurbo de iama Hungario), tiam jam ne vivis hungaroj tie. Tiel oni ordonis, ke Hungario apartenu al la Habsburg Imperio kaj oni decidis, ke hungaroj ne plu havos rajton vivi en Buda. Oni ŝanĝis eĉ la nomon de la urbo, dum la germana tempo oni uzis la nomon „Ofen” por tiu loko. Ni jam parolis pri la etnaj konfliktoj inter serboj kaj albanoj en Kosovo, sed ni vidas, ke dum multaj jaroj estas tre malamikaj rilatoj inter la rusoj kaj ukranoj en Ukrainio. Krome, tre seriozaj etnaj kaj naciaj konfliktoj okazis ankaŭ en la iama Sovetunio, Ĉekoslovakio kaj Jugoslavio, pro kio ĉiuj tiuj landoj disiĝis. Analizante tiujn historiajn spertojn oni povas konkludi, ke por multaj orient-eŭropaj landoj la amasa enmigrado kaj sekve de tio la popolmiksiĝo kaj la multkultura kunvivado ne estas alloga.

Nun ni trarigardis la plej gravajn vidpunktojn, kiel diversaj landaj kaj internaciaj organizoj kaj sociaj grupoj rigardas la fenomenon de la moderna dudekunua-jarcenta popolmigrado en la mondo. Tio estas grava socia problemo, do estas kompreneble, ke tiu temo fariĝis ĉef-temo de la ĉi-tiu-jara eŭropa parlamenta elektokampanjo. Diversaj politikaj partioj kaj sociosciencaj organizoj traktis la temon laŭ siaj propraj interesoj, sed estis nur malmultaj internaciaj konferencoj, kie estis ebleco amplekse trakti la temon kaj ĝenerale konatiĝi kun la spertoj kaj interesoj de ĉiuj grandaj landaj kaj sociaj grupoj. Ankaŭ en la IKU sesioj dum la du lastaj Universalaj Kongresoj oni traktis la temon nur laŭ la vidpunkto de la 2-a menciita socia grupo kaj pro tio la trarigardo tie tute ne estis ampleksa. Sed nun ni estas en la Baltiko, en Orienta Eŭropo, kaj pro tio mi opinias, ke ĉi tie nepre necesas konatiĝi ankaŭ kun la orient-eŭropaj spertoj por pli profunde kompreni

la realan situacion en ĉi tiu mondoparto. Fine ni menciuj ankaŭ tri aliajn punktojn por pli detale vidi la enmigradan problemon:

- La kosto de enmigrado por la Eŭropa Unio estas tre alta. Kiel mi jam menciis antaŭe, George Soros, fondinto de Fonduso por Malfermita Socio proponis en 2015, ke la EU akceptu unu milionon da enmigrintoj ĉiu-jare kaj donu al ĉiuj homoj 30,000.- eŭrojn je la komenco. Tio signifas, ke la EU devus finance subteni la enmigrintojn per 30,000,000,000.- eŭroj en ĉiuj jaroj. Tiam la EU membrulandoj ne akceptis tiun proponon, kaj pro tio George Soros publikis alian proponon en 2018⁴³ proponante, ke la EU finance subtenu Afrikon per la sama sumo, do per 30 miliardoj da eŭroj jare por malhelpi, ke afrikanoj amase migradu en Eŭropon. Laŭ tiu propono la EU devus prunti tiun sumon de internaciaj bankoj aŭ financaj fondusoj, malgraŭ la fakto, ke multaj EU membrulandoj serioze suferas pro tro da deficitito kaj financa krizo.
- La enmigrado estas grava socia problemo nuntempe, sed la situacio en la estonto estos signife pli serioza. Laŭ oficialaj UN dokumentoj (the United Nations Convention to Combat Desertification (UNCCD)⁴⁴ pli ol unu miliardo da homoj ne povas havi sufiĉe da akvo en la mondo kaj en 2030 tiu nombro pligrandiĝos per 30%. Eĉ pli grava problemo estas, ke pro ŝanĝo de natura medio kaj klimato, dezertiĝo kaj manko de pluvo post dudek jaroj 2.4 miliardoj da homoj vivos en lokoj kie la vivkondiĉoj ne estos taŭgaj por homa vivo. Pro tio translokigo de 700 milionoj da homoj estos bezonata.
- Laŭ UN prognozaj la nombro de origina loĝantaro en multaj eŭropaj landoj malgandiĝos en la estonto, sed la Afrika loĝantaro duobliĝos ĝis 2050. Tio signifas, ke pli ol unu miliardo da afrikanoj naskiĝos dum la venontaj tridek jaroj, kaj iliaj

43 <https://www.breitbart.com/europe/2018/06/07/soros-demands-europe-give-africa-30-billion-euros-year/>

44 http://www.unccd.int/Lists/SiteDocumentLibrary/Publications/Desertification_The%20invisible_frontline.pdf

vivkondiĉoj supozeble ne estos taŭgaj por homa vivo. Sekve de tio la internacia migrado kaŭzos pli seriozajn problemojn en la estonto, ol nuntempe. La alte evoluita, riĉa parto de la mondo devos trakti tiun problemon, sed nun oni ne vidas, kiel tio okazos. Laŭ historiaj spertoj ni povas supozi, ke tiu problemo estos solvota laŭ la interesoj de la plej gravaj decidopovaj internaciaj politikaj potencoj, same, kiel tio ĉiam okazis dum la kvin aŭ ses mil jara homa historio.



La Triumfa Pordego en Paris, la franca ĉefurbo. Francio subtenas la internacian migradon kaj multaj afrikaj kaj aziaj enmigrantoj deziras translokiĝi al tiu riĉa lando. Laŭ nacia statistiko en la 2012-a jaro jam 2.2 milionoj da enmigrantoj loĝis en la urba regiono de Paris.

LA SPERTOJ DE MIA INDRAMANG-METODA LINGVOINSTRUADO⁴⁵

Dum la lastaj jaroj mi instruis Esperanton kaj ankaŭ anglan lingvon en multaj aziaj lernejoj per speciala parolkapablo-evoluiga metodo (mallonge: paroliga metodo). Ĉar mi ellaboris tiun metodon en la Indramang Universitato en Koreio, pro tio mi nomas ĝin Indramang-metoda lingvoinstruado. La kurso estis tre efika, evidentiĝis, ke la logike konstruita, neŭtrala internacia lingvo Esperanto pli facile kaj rapide lerneblas, ol la naciaj lingvoj. Post kvin monata studado la studentoj kapablis flue uzi la lingvon, do oni povis konkludi, ke Esperanto povus esti taŭga pontolingvo por solvi la problemon de internacia komunikado. Poste mi havis similajn kursojn ankaŭ en tajlandaj universitatoj kaj la rezultoj ankaŭ tie estis simile pozitivaj. La ĉefaj karakterizaĵoj de tiu instrumentado estas la jenaj:

- Mi uzas la libron „*Esperanto per rekta metodo*” de Stano Marcek kaj la libron „*Ekzercaro por la Esperanto-kurso de Dr. Markus Gabor en la Indramang Universitato*”
- La studentoj lernas 30-35 vortojn en ĉiu leciono kaj por ekzerci la novajn vortojn kaj la gramatikon ili faras 10-12 paĝajn hejmtaskojn.
- Mi instruas la libron de Stano Marcek dum du semestroj. Dum la unua semestro la studentoj lernas la lecionojn 1-11 kaj dum la dua semestro la lecionojn 12-22.
- La Ekzercaro por la unua (kaj ankaŭ por la dua) semestro estas 150 paĝa. Tio signifas, ke ĝis kiam la studentoj finlernas la libron, ĝis tiam ili skribas tricent paĝan tekston en esperanto. Tiel ili povas akiri tre bonan parolkapablon kaj ankaŭ tre bonan skribkapablon dum la kurso.
- Dum la unua kaj la dua lecionoj mi ne uzas rektmetodan instrumentadon, ĉar je la komenco neniu povas rapide kaj facile

45 Ĉi tiu prelego estis preparite origine por la 49-a ILEI Konferenco en Nyíregyháza en 2016

kompreni fremdlingvan paroladon. Pro tio dum la unua kaj la dua lecionoj ni kune tradukas la tekstojn el nacia lingvo en esperanton kaj inverse. Dume, la tuta klaso kune legas laŭte la tekstojn en ambaŭ libroj kaj tuj tradukas ilin. Tiel ĉiuj kuraĝas legi kaj paroli, ĉar oni ne sole faras tion.

- Estas grave, ke mi ĉiam permesas, ke la studentoj uzu nacilingvajn vortojn dum la esperanto-lingva parolado. Temas ĉefe pri vortoj, kiujn oni kutime ne tradukas. Ekzemple ni scias, ke la signifo de la vorto „Tokyo” estas „Orienta Ĉefurbo”, tamen mi lasas, ke la studentoj uzu la nacilingvan formon de la vorto. Tiel koreaj studentoj kapablis jam post la unua (kaj la dua, ktp.) horo flue paroli kaj uzi la unuajn tridek (kaj sesdek, ktp.) vortojn kiujn ili lernis dum la unua (kaj la dua, ktp.) leciono jene: „*Mi estas Jinsim. Mi estas en la Indramang Dae-hak. (anstataŭ Indramang Universitato) Mi estas en la Sil-sangsa. (anstataŭ Silsang templo) La Silsangsa estas en la Jirisan. (anstataŭ Ĝiri montaro)*” Tute ne gravas, ke 50% de la vortoj estas nacilingvaj vortoj, sed gravas, ke la studentoj jam post unuhora aŭ duhora studado kapablas flue paroli en esperanto laŭ la esperanto-gramatiko pri sia vivo.
- Mi scias, ke en granda parto de Azio la ĉina lingvo estis la internacia komunikilo dum multaj jarcentoj, do kiam aperas nekonata nova vorto, tiam kutime mi skribas la ĉinan ideogramon de la vorto sur la tabulon por komprenigi la signifon de la vorto al la studentoj.
- Necesas doni motivon por diligente lerni al la studentoj. Pro tio ni donas atestilojn por la kursanoj laŭ la peto de la studentoj. La studentoj povas utiligi tiujn atestilojn en sia universitato kaj ankaŭ kiam ili volas dungigi en internaciaj organizoj, ĉar tiel ili povas dokumenti, ke ili jam iel ligiĝas al la eŭropa kulturo.
- Por multaj studentoj estus tro laciga kaj bezonus tro longan tempon ellerni la tutan libron por ricevi atestilon iam en la

fora estonto. Pro tio ni donas atestilon pri la sukcesa finlerno de la enkonduka esperanto-kurso jam post la kvara leciono.

- Por plu motivi la studentojn ni kutime ofertas ankaŭ financajn subvenciojn. Se studento finas sukcese la unuan studprogramon, tiam ni ofertas al li aŭ ŝi la lernolibrojn senpage. Kaj la plej diligentaj studentoj eblas ricevi financon subvencion por partopreni internaciajn esperanto-renkontiĝojn.
- Instruisto ne povas paroligi la studentojn se li faras demandojn al kiu eblas simple respondi per „jes”, aŭ „ne”. Pro tio mi ĉiam paroligas la studentojn pli komplike, helpante, ke ili parolu longe, ekzemple jene: „*Ĉu mi bone scias, ke vi estas Gyeongsim kaj vi havas amerikan edzon? - Tute ne. Vi malbone scias. Mi ne estas Gyeongsim, sed mi estas Maneog. Gyeongsim estas virino, sed mi estas viro. Gyeongsim sidas apud mi, sed ŝi ne havas amerikan edzon. Ŝi havas korean edzon. Ankaŭ mi ne havas amerikan edzon, sed mi havas korean edzinon.*”
- Estas grave, ke la parolataj temoj estu surprizigaj kaj interesaj, ekzemple jene: „*Ĉu mi bone scias, ke malgrandaj hundoj havas unu kapon, la pli grandaj hundoj havas du kapojn kaj nur la plej granda hundo havas tri kapojn? - Tute ne. Vi malbone scias. Ĉiuj hundoj havas nur unu kapon.*”
- Estas ankaŭ grave, ke ne nur la instruisto demandu, sed li ebligu, ke la studentoj rekte parolu unu al la alia. Kaj gravas, ke ankaŭ tiu konversacio estu surpriziga kaj interesa, ekzemple jene (rilate al la leciono 3 de la Stano Marcek libro): „*Saluton, mi estas Ploy. Kiu vi estas? - Saluton, mi estas Non. Ĉu vi estas eŭropa homo? - Ne, mi ne estas eŭropa homo, sed mi estas taja homo. Kie estas la glaso? - Ĝi estas sur la tablo. Ĉu ankaŭ la kato estas sur la tablo? - Jes. - Ne, ne, ne. La kato ne estas sur la tablo, sed ĝi estas sub la tablo. - Dankon.*” En tiu parolada ekzerco estas grave, ke la studentoj intence donu falsajn repondojn por ke ili povu pliinteresiĝi la konversacion kaj por ke ili povu paroligi la aliulojn.

- Laŭ la tradiciaj instrumentoj oni instruas lecionojn kaj klarigas gramatikajn regulojn dum monatoj eĉ jaroj, sed ofte okazas, ke la lernantoj eĉ post multjara lernado ne povas flue paroli en fremdaj lingvoj. En miaj kursoj estas malsame. En la libro de Stano Marcek estas naŭdek aŭ cent vortoj en la unuaj tri lecionoj. Tamen jam post la tria leciono miaj studentoj kapablas flue kaj longe paroli pri sia vivo dum longa tempo kaj kapablas respondi al demandoj sen eraroj uzante nur malpli ol cent vortojn.⁴⁶
- Estas preskaŭ miraklo, ke post la deka leciono miaj studentoj kapablas paroli pri sia ĉiutaga vivo, familio kaj agado en la universitato dum dudek minutoj kaj povas skribi, legi kaj traduki du aŭ tripaĝajn leterojn, uzante nur tricent aŭ tricent kvindek vortojn. Estas miraklo ke tute komencanta tajlanda studentino post kvardek taga lernado sukcese povis atingi tiun rezulton (krom sia laboro).⁴⁷
- Granda avantaĝo de tiu instrumentado estas, ke la studentoj ege rapide progresas, kaj post kelktaga aŭ kelksemajna lernado ili kapablas flue uzi la lingvon kiel videblis en la menicita ekzercaro. Estas alia avantaĝo, ke la studentoj havas fortan memfidon, ĉar ili ĉiutage sentas, ke ili ĉion komprenas kaj ili efike povas komunikiĝi en la klaso. La averaĝa rezulto de la studentoj estas ĉiam pli alta, ol 90%, do el cent erareblecoj estas nur malpli ol dek eraroj en la hejmtaskoj de la lernantoj.
- Granda malavantaĝo de tiu instrumentado estas la samo, kion ni menciis inter la avantaĝoj. Temas pri tio, ke la studentoj ege rapide progresas, kaj post kelktaga aŭ kelksemajna lernado ili kapablas flue uzi la lingvon. Do, la sama fenomeno, la nekredible rapida progreso povas okazi kaj avantaĝojn kaj

46 Vidu la detalojn en la libro: „*Ekzercaro por la Esperanto-kurso de Dr. Markus Gabor en la Indramang Universitato*”

47 Vidu la detalojn en la deka kaj dekunua ĉapitroj de la menciita libro

malavantaĝojn. Estas strange, ĉu ne? Sed estas tiel. Ĉar se studento ne ĉeestas unu aŭ du lecionojn, tiam li aŭ ŝi spertas ke ŝi apenaŭ komprenas pri kio la aliuloj parolas. Pro tio ili perdas memfidon kaj emus ĉesi la lernadon, eĉ la kurson, se oni ne donus al ili kromlecionojn. Tiam estas grava dilemo: *Ĉu tiam la instruisto ripetu kaj ripetigu la malnovajn lecionojn por ke ankaŭ tiuj studentoj konservu memfidon aŭ ĉu oni plu instruu laŭ la origina plano?*

- Estas ĝenerala sperto, ke mankas tempo por ambaŭ la instruisto kaj la studentoj por ĉeesti longan (unumonatan aŭ dumonatan aŭ pli longan) kurson kaj multaj alilandaj instruistoj tute ne povus restadi en fremdaj landoj dum tiom longa tempo. Por solvi tiun problemon mi enkondukis specialan instrumentodon. Dum unu semajno (aŭ dum du semajnoj) mi persone instruas la studentojn en klasĉambro kiam la studentoj lernas kune kaj grupe. Dum tiu kurso ili povas ellerni la unuajn kvar lecionojn kaj povas ricevi la unuan atestilon pri la sukcesa fino de la enkonduka kurso. Kaj dum tiu tempo la studentoj ellernas, ke ili ankaŭ sole povas uzi la lingvolibron de Stano Marcek, ĉar ili trovas la signifojn de la nekonataj vortoj en ĝi kaj ankaŭ la gramatikajn regulojn.
- Poste povas okazi la dua parto de la kurso. Tiam la studentoj mem lernas, kaj faras la ekzercojn laŭ mia ekzercaro en sia hejmo. Poste ili sendas siajn hejmtaskojn al mi per interreto. Mi korektas la hejmtaskojn kaj laŭ la eraroj la studentoj povas kontroli: ĉu ili bone komprenis la gramatikon aŭ ne. Kaj kompreneble kutime ili pligrandigas sian memfidon ĉar la hejmtaskoj estas aŭ sen araroj aŭ troviĝas en ili nur malmultaj (malpli ol 10%) miskomprenoj. Mia plej diligenta tajlanda studentino povis atingi sian altnivelan parolkapablon per tiu instrumentodo dum kvardek tagoj krom sia laboro. Poste ŝi ricevis nian diplomon rilate al la sukcesa kompletigo de nia kurso. Poste per nia subteno ŝi estis akceptite en japana universitato, kie ŝi sukcese ricevis magistran gradon en internaciaj rilatoj.

- Niaj ekzercaroj aperas en naciaj lingvoj, do tiel oni povas montri la esencon kaj la utilecon de la esperanto-instruado ankaŭ al la neesperantista loka komunumo. Ekzemple al universitataj profesoroj kaj dekanoj, kiuj rajtas ebligi la organizadon de esperanto-instruado en sia lernejo.



La mil ducent jara Silsangsa templo kaj ĝia Indramang Universitata Prelegĉambro en trankvila arbaro en la Ĵirisan montaro



LA ESPERO⁴⁸

(Ŝancoj, ke Esperanto fariĝos internacie akceptita komuna pontolingvo en la mondo)

.....

Okaze de la lasta ĝenerala kunsido de Hungaria Esperanto Asocio la partoprenantoj unuanime elektis s-ron D-ron Márkus Gábor honora prezidanto de HEA. Li diris la solenan paroladon pri la centjariĝo de la morto de Zamenhof. Mi kaptis la okazon peti de li artikolon por nia faka revuo „Hungara Fervojista Mondo” pri lia Esperanto aktiveco, kion li ĝoje entreprenis. Mi devas rimarki, ke D-ro Márkus Gábor estas „unika figuro en la internacia esperantista komunumo”, ja li instruas, prelegas eĉ gvidas kursojn en diversaj aziaj universitatoj kaj sociaj organizoj. Eĉ li estas komitatano de nia landa asocio ĉe UEA, pro kio ni hungaraj esperantistoj estu fieraj, ke tiu agema kaj saĝa homo reprezentas nin en la plej grava organizo de esperantistoj. Sekvos lia festparolo dum la 2017-jara Zamenhofs Festo.

*Gulyás István
respondeca redaktoro de Hungara Fervojista Mondo*

.....

En mia vivo la Nanzan Universitato en japana urbo Nagoya estas tre grava loko, ĉar kiel hungara studento antaŭ tridek jaroj mi komencis konatiĝi kun la orientazia kulturo kaj kun la japana lingvo en tiu loko. En 1982 mi kiel malriĉa orienteŭropa studento sen mono en mia poŝo, sen kreditkarto alvenis al la jam riĉa Japanio, parolante nek la anglan, nek la japanan lingvojn, kaj sciante nenion pri la ekonomia kaj socia situacio de Orienta Azio. Tiam mi vivis en Japanio tre modeste, sed danke al la stipendio de la japana entrepreno Verda Stelo,

48 Solena parolo de la Aŭtoro dum la 2017-jara Ĝenerala Kunsido de Hungaria Esperanto-Asocio, kiam li elektiĝis honora prezidanto de HEA. La teksto (iom mallongigite) aperis en la 3/2017 numero de la Hungara Fervojista Mondo

mi povis sukcese fini mian studprogramon en la Nanzan Universitato. Tiam mi povis aĉeti vojaĝbileton inter Hungario kaj Japanio, sed vojaĝi per aviadilo estis tro multekosta. Pro tio mi vojaĝis inter Budapeŝt kaj Nakhodka per la transsiberia trajno, kaj inter Nakhodka kaj Yokohama per rusa ŝipo.

Antaŭ tridek jaroj, je la komenco de mia japana studprogramo, mia sola kontakto al la orientazia socio estis mia kunlaboro kun la japana Esperanto-movado. Per la helpo de tiu kunlaboro mi povis atingi nekredeblan sukceson kaj povis konstrui mirinde sukcesan profesion kareeron. Post la fino de mia studprogramo mi hejmenvojaĝis, kaj konstruis tre viglajn internaciajn sciencajn kaj sociajn kontaktojn inter diversaj eŭropaj kaj orientaziaj sciencaj, industriaj, komercaj kaj sociaj organizoj.

Mi regule partoprenis konferencojn kaj kunvenojn en universitatoj kaj diversaj sociaj organizoj, kaj mi fondis komunan entreprenon kun posedantoj de alilandaj industriaj entreprenoj. Krome, mi ankaŭ verkis sukcesajn librojn en multaj lingvoj. Mi invitis al mia budapeŝta universitato famajn orientaziajn profesorojn por ke ili enkonduku nin al la japana, ĉina kaj korea kulturo. Tiel So Gilsu el Koreio, Shen Chenru el Ĉinio kaj Mizuno Yoshiaki el Japanio vizitis nin. Ili ĉiuj estis esperantistoj, do komunikiĝi kun ili estis tre facila por ni. Estis granda honoro por mi, ke ankaŭ Akashi Yoĵi, neesperantista dekanato de Nanzan Universitato vizitis nin en Budapeŝt. La prelego de profesoro So Gilsu en nia budapeŝta universitato estis signifa kaj grava ne nur por mi, sed por la tuta hungara esperantista ekonomista komunumo, ĉar li vizitis nian universitaton tuj post la politikaj ŝanĝoj en Orienta Eŭropo. Per liaj klarigoj ni komprenis en grava historia tempo, kiel ni devus konstrui modernan merkatekonomian sistemon en Hungario.

Resumante la rezultojn de mia scienca esplorprogramo en la Nanzan Universitato mi doktoriĝis en la Budapeŝta Ekonomika Universitato. Poste mi fariĝis estro de la plej granda hungara industria korporacio, kaj mi laboris kiel strategia manaĝero en la Hungara Nacia Petrola Korporacio. Post la politikaj ŝanĝoj en Orienta Eŭropo mi laboris por

la hungara parlamenta Kontrola kaj Aŭditora Oficejo, kie mia tasko estis kontroli la registaron. Krome, oni petis ke mi fariĝu ankaŭ redaktoro de la plej grava hungara komputteknika periodaĵo, respondecante pri orientaciaj temoj.

En mia profesia kariero en miaj ambaŭ laborejoj mi regule uzis Esperanton por konstrui pli vastajn internaciajn rilatojn, utilajn por miaj oficejoj. Mi publikigis artikolojn en la hungara ĉefministra organo kaj ankaŭ en la revuo de nia Financa Ministrejo. Tiel evidentiĝis por la legantoj kaj ankaŭ por la estraro de niaj registaraj institucioj, ke je la fino de la dudeka jarcento Esperanto jam estis utila ilo por konstrui efikajn internaciajn sciencajn, fakajn, kulturajn kaj ekonomiajn rilatojn.

Dum la lastaj jaroj mi kutime pasigis kelkajn semajnojn aŭ monatojn en Seulo. Tie troveblas la oficejo de la Seula Esperanto Kulturcentro, kies prezidanto Lee Jungkee estas docento de du koreaj universitatoj, instruante tie la internacian lingvon. Li regule organizas specialajn konferencojn por lingvistoj kaj lingvoinstruistoj, eĉ li preparas diversajn kulturajn kaj religiajn renkontiĝojn. Dum la lastaj jaroj oni regule petis min prelegi en tiuj eventoj, kaj ankaŭ tie mi sukcesis establi pli novajn kunlaborojn kun ĉinaj kaj japanaj universitatoj kaj sociosciencaj organizoj.

Samtempe mi kunlaboras ankaŭ kun profesoroj de la Nanzan Universitato en Nagoya, same kun la estraro de la Internacia Kongresa Universitato en la vjetnamia ĉefurbo Hanojo. Estas granda honoro, ke koreoj ofte akceptas mian inviton al Budapeŝto, kaj ili disvastigas la korean kulturon en nia lando. Speciale grava evento estis, ke fama korea artpentristo Ho Song organizis sukcesan ekspozicion en Budapeŝto, eĉ li donacis valoran pentraĵon al nia Hungaria Esperanto-Asocio. Ankaŭ multaj aliaj koreoj vizitis nin, kiuj prelegis pri la korea instrusistemo, instruis kuiri bongustajn koreajn manĝaĵojn, kaj konigis la korean kulturon kaj vivon al nia komunumo.

Vojaĝante en Japanio, Ĉinio kaj Koreio mi kun ĝojo konstatis, ke mi jam povas legi la skribaĵojn sur la muroj en tri lingvoj, foje eĉ en

kvar lingvoj, do angle, japane, ĉine kaj koree. La plej grava rezulto por mi estas, ke mia taglibro estas plena kun internaciaj kulturaj, sciencaj kaj fakaj programoj, en kiuj mi estas petata prelegi pri miaj spertoj en ekonomio, financa kontrolo, lingvistiko, religio kaj kulturo. Tiun sukceson mi atingis de mia studprogramo en la Nanzan Universitato, pere de mia kunlaboro kun gravaj ĉinaj kaj koreaj universitatoj, akademioj kaj kulturaj organizoj kaj pere de la helpo de la internacia lingvo Esperanto.

Mi prelegis en la japana kongreso en Tokyo, en la konferenco de aziaj lingvoinstruistoj, kaj en aliaj konferencoj kaj renkontiĝoj. Mi rimarkas, ke tiuj bonaj travivaĵoj riĉigas kaj ĝojigas ne nur mian vivon, sed ankaŭ la vivon de nia hungara esperantista komunumo. Post miaj aziaj vizitoj multaj eŭropaj institucioj petas, ke mi prelegu pri miaj spertoj de la riĉa azia kulturo, arto, kuirarto kaj religio.

Nuntempe kelkaj ĵurnalistoj kritikis Esperanton, ke ĝi ne sukcesis fariĝi vera mondlingvo dum pli ol cent jaroj. Malgraŭ tio mi asertas, ke kvankam Esperanto ankoraŭ ne estas vera mondlingvo, sed la internacia Esperanto-movado jam ekzistas, kaj en multaj landoj bone prosperas. Mi povas diri, ke Esperanto havas ŝancon estiĝi vera mondskala interlingvo iam en la estonto. Se tio ne sukcesis dum la unuaj cent jaroj, estas ŝanco, ke tio realiĝos en la dua aŭ en la tria centjara epoko.

Simile, kiel okazis en la historio de kristanismo. Je la komenco, kiam Jesuo Kristo fondis tiun novan religion, estis nur kelkcent homoj, kiuj apartenis al tiu komunumo. Eĉ cent jarojn post la fondo de tiu religio, la kristana eklezio estis oficiale neakceptita en la tiam mondo, kaj ĝi estis persekutita dum pli ol tricent jaroj. Sed dum la unua parto de la kvara jarcento la situacio multe ŝanĝiĝis. Tiam Granda Konstantino romia imperiestro deklaris, ke kristanismo estu oficiale akceptita kaj poste ĝi fariĝis oficiala ŝtatreligio en la tuta Romia Imperio. Poste ĝi estis la plej granda religia organizo en la okcidenta mondo, kaj nuntempe jam 2,2 miliardoj da homoj, do triono de la homaro apartenas al la diversaj kristanaj eklezioj de la mondo. En la dudekunua jarcento jam preskaŭ la tuta homaro scias aŭ aŭdis ion pri la instruo de Jesuo Kristo.

Alia ekzemplo estas la budhismo. La instruon de Budho komence nur malmultaj homoj aŭskultis kaj sekvis, kaj nun – pli ol 2500 jaroj post la naskiĝo de Budho – la nombro de la budhista komunumo superas la kvincent milionojn.

Eĉ pli karakteriza ekzemplo estas la sorto de la judoj. Antaŭ tri mil jaroj la unua juda reĝo David okupis Jerusalemon, ĉe la monto Cion (Sion) kaj tie fondis novan judan ĉefurbon. Sed poste la Romia Imperio okupis tiun lokon kaj tiel Jerusalemo estiĝis ĉefurbo de romia provinco. Dum la unua jarcento la judoj ribelis kontraŭ la romianoj. La ribelon la romiaj legioj kruele venkis, ili detruis Jerusalemon, kaj elpelis la loĝantaron.

Similaj eventoj okazis ekde tiam dum multaj jarcentoj en multaj aliaj landoj kaj kontinentoj kun la judoj, kiuj vivis en diasporoj. Malgraŭ ĉiuj malavantaĝoj la judoj konservis sian religion kaj nacian identecon dum du mil jaroj. Ili konservis la esperon, ke iam en la estonto ili havos ŝancon reiri al la loko, kie ili havis sian landon antaŭ multaj jarcentoj.

Post kiam la romia imperiestro ordonis, ke judoj forlasu Jerusalemon, ili translokiĝis al aliaj lokoj. Sed en multaj lokoj ili suferis pro diskriminacio. Ekzemple en 1492, kiam Kristoforo Kolombo malkovris Amerikon, ankaŭ la hispana reĝo ordonis, ke judoj forlasu Hispanion. Dum la mezepoko en multaj landoj ili ne rajtis vivi en urbocentroj, sed nur en specialaj kolonioj. En la cara Ruslando eĉ atakoj kaj pogromoj okazis kontraŭ ili. En la dek naŭa jarcento Jerusalemo apartenis al la islama Turklando, kiel parto de la Palestina provinco. En tiu tempo okazis, ke juda poeto nomita Naftali Herz Imber vivis en Galicio (en Orienta Eŭropo) kaj en la jaro 1878 li verkis la venontan poemon kun la titolo: „*Hatikvah*” (*La Espero*).

„*Kol ód baléváv penímá,
nefes jehudí hómijá,
úl(e)fa'até mizrah kádímá,
ajin leCijón cófijá*

„*Ĝis kiam la koro batas,
judoj sopiras pensante
al Orienten,
la okuloj rigardas al Cion.*

*Ód ló avdá tikváténú,
hatikvá hánnosáná,
lásuv le-erec avoteinú –
Láir bá Dávid cháná.”*

*Ankoraŭ ne perdiĝis nia espero,
nia multcentjara espero,
reiri al la tero de niaj prapatroj,
al la urbo kie David vivis.”*

La formiĝo de la historio ne estas antaŭvidebla, kaj tiel okazis, ke en la dudeka jarcento estiĝis ŝanco fondi memstaran judan nacian ŝtaton, kaj tiel la judoj finfine rericevis sian hejmlandon. Kaj du mil jarojn post ilia elpelo, ilia espero realiĝis. Ili nun vivas en sia hejmlando, en Israelo kaj la himno de tiu lando estas la poemo de Naftali Herz Imber: „*La Espero*”.

Do ankaŭ ni esperantistoj devas gardi la esperon, ke iam en la estonto la homaro komprenos, ke pro sia neŭtraleco, facileco kaj logika gramatiko la lingvo Esperanto povas esti taŭga komunikilo por fariĝi ĝenerale akceptita interlingvo en la tuta mondo. Sed por atingi tiun celon estas du gravaj kondiĉoj:

1. Ni devas konservi la lingvon dum longa tempo (eble eĉ dum jarcentoj) kaj pro tio ni bezonas instrui nian lingvon al la membroj de novaj generacioj.
2. Ni devas montri al la ekstera neesperantista mondo, ke nia komunumo estas bona kaj alloga, por ke novaj esperantistoj aliĝu al nia movado, kaj por ke ili vaste uzu nian neŭtralan internacian lingvon. (Bedaŭrinde la konfliktoj kaj kvereloj inter diversaj Esperanto-organizaĵoj kaj la malamikecaj disputoj en niaj naciaj kaj internaciaj asocioj malhelpas realigi tiun celon.)

La fina venko de Esperanto estas nur malproksima celo, sed la lernado de nia internacia lingvo jam ankaŭ en nia nuna vivo estas tre utila kaj fruktodona. La lernado de Esperanto estas dumviva okupo, sed estas grave kompreni ke la lernado signifas ne nur lingvolernadon. Per la lernado kaj uzado de Esperanto ni facile povas konstrui bonajn internaciajn rilatojn, kaj ni povas amikiĝi kun multegaj amikecaj homoj en la tuta mondo. Tiamaniere ni povas pli bone kompreni la mondon en kiu ni vivas, kaj farante tion ni povas nekredeble signife riĉigi kaj valorigi nian vivon.



Supre: La ruinoj de la iama Templo en Jerusalemo, kiun la judoj vizitadis dum jarmiloj por rememori la originon de sia hejmlando.

Malsupre: La Ŝtonega Templo sur la Moriah-monto estas sankta loko por tri mondreligioj: por judoj, kristanoj kaj islamanoj.



STELO SUPER LA HAN-RIVERO

Kortuŝa rakonto

Se oni nomas budhismon „*la religio de kompato*” kaj kristanisman „*la religio de amo*”, tiam ŭonbulisman indus nomi „*la religio de bonfaroj*.” Ĉar laŭ Jesuo, fondinto de kristanismo „*la ordono de amo*” estas la plej grava inter ĉiuj ordonoj, kiujn homoj devas obei sur la Terglobo. Sed Sotesano, fondinto de ŭonbulismo instruis, ke bonfaroj estas la plej gravaj.

La membroj de ĉi-tiu ŭonbulisma komunumo ne nur parolas pri tiuj instruoj, sed ili ankaŭ klopodas vivi en sia ĉiutaga vivo laŭ tiuj instruoj kaj moralaj devoj. Pro tio oni povas sperti, ke la renkontiĝoj de la Esperanto-Asocio de Uonbulisma Eklezio ĉiam estas bonetosaj, kie la partoprenantoj bone fartas, amike salutas unu la aliajn kiel malnovaj amikoj, kaj eĉ nekonatulojn dece salutas kaj respektas kiam ili renkontiĝas promenante en la parkoj de la Uonbulisma Religia Centro. Simile, kiel okazis dum mia juneco ankaŭ en la hungaraj vilaĝoj.

Pro tio mi kaj Elizabet pensis, ke antaŭ la 2018-jara Japana-Korea Komuna Esperanto-Kongreso ni vojaĝu al Koreio, por ke ni partoprenu la *Internacian Meditadan Renkontiĝon* de tiu organizaĵo, simile, kiel ni regule faris dum la lastaj jaroj. Dum la renkontiĝo okazis multaj interesaj kulturaj programoj kaj unu el ili estis interesa kortuŝa filmeto. La mesaĝo de la filmeto estis, ke bonfaroj estas la plej bonaj metodoj por valorigi, riĉigi kaj beligi nian vivon, do helpi aliulojn estas la plej bona formo de homa komunikado.

En la unua sceno de la filmo ni vidis, ke homoj kaptis 7-jaran, aŭ 8-jaran tajlandan knabon en bangkoka bazaro, kies nomo estis Prajak Arunthong. Li ŝtelis kelkajn medikamentojn en la apoteko. Komenĉiĝis kriado, kolerado kaj laŭta torturo de la mastrino de apoteko:

- *Kion vi ŝtelis? Kion vi volis fari per ĝi?* - demandis kolereme la mastrino.

- *Mia patrino malsaniĝis kaj mi deziris doni la medikamentojn al ŝi kontraŭ doloro* - respondis la timigita infano.

Tiam aperis kuiristo, kiu estis mastro de malgranda manĝejo apud la apoteko. Li havis kompaton al la familio de la infano kaj pro tio li anstataŭpagis la monon de la ŝtelita medikamento al la apoteko. Poste li donacis eĉ porcion da freŝe kuirita veggio-supo al la infano. Li volis helpi tiel, ke la infano kunportu la bezonatajn medikamentojn kaj la supon al ŝia patrino.

Poste aperis nova sceno en la sama loko, post tridek jaroj: La kuiristo neatendite kolapsis kaj ambulanco veturigis lin al hospitalo. Tie oni savis lian vivon kaj post la kuracado oni transdonis al li la provizoran fakturon pri la hospitalaj kostoj. La sumo estis 792,000.- bahtoj, do pli-malpli 2500,0000.- ŭonoj.

Poste venis alia sceno: La malgajaj familianoj de la kuiristo metis anoncon sur la muron de sia hejmdomo: „*Ni volas urĝe vendi ĉi-tiun domon, por ke ni povu pagi neatenditajn hospitalkostojn*”.

Poste aperis la fina sceno sur la ekrano: Post kelkaj tagoj, la familianoj de la resaniĝinta kuiristo ricevis la finfakturon de la hospitalo kaj vidis kun surprizo, ke la antaŭvideblaj nombroj malaperis kaj estis skribite nova teksto: „*La pagenda sumo estas 0.- bahtoj*.” Kaj aperis ankaŭ klarigo: „*La familio jam pagis ĉi tiun hospitalkoston antaŭ tridek jaroj per tri pakaĵoj da medikamento kontraŭ doloro kaj per porcio da veggio-supo. Subskribo: Dr. Prajak Arunthong, direktoro de hospitalo*”.

Renaskiĝo en Seulo

Oni organizis la Japanan-Korean Komunan Esperanto-Kongreson en Nara, la unua ĉefurbo de la Japana Imperio. Tie mi prelegis pri la sepdek mil jara historio de homa kulturo laŭ la libro de Nobel-premita medicina profesoro Christian de Dube. La Yale University Press aperigis tiun libron antaŭ nelonge kun la titolo: „*Genetics of Original Sin: The Impact of Natural Selection on the Future of Humanity*” (Genetiko de Origina Peko: La efekto de Natura selektado al la Es-

tonto de Homaro). Mi metis ankaŭ la pensojn de Yuval Harari, doktoro de Oxford Universitato kaj profesoro de jerusalema Hebrea Universitato en mian prelegon. Harari eksplikis siajn ŝokigajn pensojn rilate al tiu temo en sia fama libro, kies titolo estas: „Sapiens”. La konkludojn de tiu libro oni vaste diskutas ĉie en la mondo, la libro aperis en pli ol unu miliono da ekzempleroj en 58 diversaj lingvoj.

Por pli bone konatiĝi kun la beleco kaj kulturaj valoroj de la fama malnova japana urbo, ni alvenis al Nara du tagojn antaŭ la kongreso. Dum la unua tago niaj japanaj geamikoj promenadis kun ni kaj ili montris al ni la vidindaĵojn de la urbo. Ni rigardis kun ĝojo la plej grandan Budho-statuon de Japanio en la Daibucuden sanktejo de la Todajji templo, kiu estas 15 metra alta. Krome, ni promenis ĉirkaŭ la fama kvinetaĝa Pagodo, kiu estas simbolo de la urbo. Dum niaj promenadoj ni miris multegajn cervojn kiuj amikece promenadis kun ni en la stratoj kaj parkoj de la urbo. Post la agrabla ekskurso ni kune vespermanĝis kun niaj japanaj geamikoj en ĉina restoracio en la urbocentro.

Dum la venonta mateno Elizabet ekhavis abdomenan doloron kaj suferis pro vomado. Pro tio ŝi ne povis ĉeesti la kongresajn programojn. Post la fino de la kongreso ni revojaĝis al Koreio, ĉar la direktoro de la 문일여자 고등학교 (Moonil Yeoja Godeung Hagkyo) supermezlernejo petis, ke ankaŭ tie mi prelegu en angla lingvo pri la sepdek mil jara mondhistorio de homa kulturo. Post mia prelego mi revojaĝis al nia hotelo kaj tie mi vidis ke la sanstato de Elizabet plimalboniĝis. Pro tio mi vokis ambulanco kaj veturis al hospitalo. Tiel kelkajn minutojn antaŭ noktmezo ni alvenis al la Korea Universitata Medicina Centro, kiu troviĝas en Anam distrikto de Seulo.

Tie ni pagis 220,000.- ŭonojn por la ambulanca veturado kaj por la unua medicina ekzameno. Poste oni anoncis, ke por konkludi, kio estas la diagnozo, neceso fari ankaŭ aliajn ekzamenojn (ekzemple: CT = perkomputila tomografo, analizo de sangokomponentoj en laboratorio, ktp.) kaj por fari tion necesas antaŭpagi denove unu milionon da ŭonoj. Post kiam mi pagis ankaŭ tiun sumon, oni lasis nin

eniri la ĉambron de urĝaj ekzamenoj kaj oni komencis la ekzamenojn. Post kelkhora ekzamenado oni anoncis la diagnozon: temas pri intesta obstrukco, latine: ileus. Tio signifas ke la malgrandaj intestoj ne povas funkcii. Por kuraci tiun malsanon nepre necesas enhospitaliĝi, kaj por fari tion mi denove devis antaŭpagi kvar milionojn da ŝonoj.

Je la komenco ni ricevis litojn en la Internacia Ĉambro de la Hospitalo, kie oni provis solvi la problemon per konservativa traktado. Sed post kelkaj tagoj evidentiĝis, ke la malsano ne pliboniĝis, do la operacio estis neevitebla. La situacio estiĝis vivdanĝera, kiam oni konstatis, ke krom la intesta obstrukco ankaŭ pneŭmonio aperis. La afero estiĝis eĉ pli serioza, kiam la CT ekzameno montris, ke embolio montriĝis en la pulma arterio kaj ankaŭ pulma infarkto montriĝis en la korpo.

Laŭ la anestezisto estis risko, ke la dormiganta gaso plimalbonigos la staton de pulmoj kaj pro la uzo de antikoagulaĵo ne eblos fari la necesan operacion. Malgraŭ la fakto, ke por kuraci la embolion la uzo de antikoagulaĵo estas nepre bezonata. Aliflanke, se oni ĉesas uzi la antikoagulaĵojn, tiam oni riskas, ke la pulma embolia problemo pligrandiĝos kaj pligraviĝos.

Informiĝante pri la serioza situacio, niaj koreaj geamikoj, kiuj estis plejparte membroj de la Esperanto-Asocio de Ŭonbulisma Religio, komencis subteni nin tre efike kaj sindoneme. Similan efikan kaj sindoneman helpon kaj subtenon mi neniam povis sperti antaŭe en la eŭropaj esperantistaj komunumoj. Kiam mi skribis al niaj malnovaj koreaj geamikoj, ke mi devus pagi kvar milionojn da ŝonoj por la hospitalaj kostoj, kaj povus okazi ke la hospitala bankterminalo ne akceptos miajn kreditkartojn pro la pli malaltaj limigitaj tagaj uzeblaj monsumoj, tiam ili: 조명자 (Ĝoja) kaj 전대봉 (Daebong) tuj aperis en la hospitalo kaj pruntedonis al ni du milionojn da ŝonoj. Malgraŭ la fakto, ke ili loĝis ne proksime al la hospitalo en Seulo, sed en alia urbo nomata Bucheon, kiu estas kvardek kvin kilometroj de Anam.

Kiam montriĝis, ke la konservativa kuracmaniero ne estis sukcesa, ĉar temis pri mekanika obstrukco en la intestoj, tiam evidentiĝis, ke la operacio estis urĝa, necesa kaj neevitebla. Profesorino Baek Sejin faris la operacion kaj danke al ŝia profesieco kaj zorgemeco la operacio estis sukcesa. Pro la embolia danĝero post la operacio oni tuj komencis la antikoagulaĵan terapion kaj oni konservis Elizabeton en la Intensiva Ĉambro. Sed post kvin tagoj la kuracistoj devis fini la antikoagulaĵan terapion pro sangadaj tendencoj. Poste venis kriza tempo, kiam oni povis fari nenion, nur atendi por ke la „*natur*o” decidu, kia estu la fino de la malsano. Aliaj homoj opiniis, ke ĉar ne eblis uzi medikamentojn, en similaj vivdanĝeraj kazoj ne la „*natur*o” sed nur „*supernaturaj potencoj*” povos savi la vivon de la malsanulo.

Informiĝante pri la gravaj malsanoj, niaj geamikoj komencis preĝadi por Elizabet ne nur en multaj lokoj de Koreio, sed ankaŭ en Eŭropo, eĉ en Ameriko. La komunumo de 한속희 (Kristalo), nia malnova amiko decidis preĝi por la resaniĝo de Elizabet ĉiutage dum cent tagoj. Krome, niaj geamikoj organizis, ke iu el la loka esperantista komunumo vizitu nin en la hospitalo ĉiutage por helpi nian komunikadon kun la kuracistoj kaj flegistinoj de la hospitalo kaj deĵorante helpi Elizabeton, kiam mi ne povis esti kun ŝi en la hospitalo. Tiel mi povis eliri el la hospitalo de tempo al tempo por aranĝi oficialajn aferojn, purigi min en hotelĉambro kaj ŝanĝi uzitajn vestaĵojn. Estis tagoj, kiam pli ol dek homoj venis viziti kaj kuraĝigi Elizabeton, kaj estis vizitanto, kiu vojaĝis dum ok horoj por vidi ŝin.

Danke al la altnivela profesia laboro de la kuracistoj de la Korea Universitata Medicina Centro en Anam kaj danke al la helpo de niaj koreaj geamikoj, kiuj subtenis nin kaj kiuj preĝis por la resaniĝo de Elizabet, ŝia sanstato komencis pliboniĝi kaj aperis espero, ke post kelkaj tagoj ni povos elhospitaliĝi. Vidante la antaŭan vivdanĝeran sanstaton ni povas atesti, ke Elizabet renaskiĝis en Seulo. En tiuj tagoj la financaj oficistoj de la hospitalo rekalkulis la hospitalajn kostojn kaj konkludis, ke la kostoj por la unuaj dek kelkaj tagoj estis ne kvar milionoj da ŭonoj, kiel oni pensis antaŭe, sed estiĝis pli ol dudek naŭ milionoj da ŭonoj.

Pro tio ni devis zorgi ne nur pro la malsano de Elizabet, sed ankaŭ pro la ebleco, ke la tuta hospitalkosto povos atingi tiom altan sumon, kian ni jam ne kapablos pagi. Sekve de tio ni devis preĝi ne nur por la resaniĝo de Elizabet, sed ankaŭ por tio, ke ni povu trovi sufiĉe da mono por pagi ĉiujn hospitalkostojn. Kvankam mi neniam parolis pri tiuj zorgoj kun niaj koreaj geamikoj, ili iel sentis tiun problemon. Tio montriĝis al mi, kiam mi aŭdis, ke 오순모 (Brila), vicprezidantino de Korea Esperanto-Asocio kaj estrarano de Esperanto-Asocio de Ŭonbulisma Religio metis anoncon en la interreton, klarigis nian situacion kaj petis, ke homoj kontribuu al niaj nekredeble altaj hospitalaj kostoj.

Dum dudek kvar horoj okazis miraklo, kian ni neniam povis sperti en la eŭropaj esperantistaj komunumoj. Dum unu tago ok milionoj da ŭonoj kolektiĝis por finance subteni nin. Kaj estis ĝojinda surprizo por ni, ke ne nur konataj esperantistoj provis helpi nin. Inter la homoj, kiuj legis la anoncon de Brila, aperis ankaŭ Dr. Park Jong Mok, esplora profesoro en la Jura Fakultato de Korea Universitato, kiu ne apartenis al la ŭonbulisma esperantista komunumo kaj kiu ne estis membro de Korea Esperanto-Asocio. Legante la anoncon ankaŭ li decidis helpi nin. Li vizitis la prezidanton de nia hospitalo kaj petis, ke li plimalgrandigu niajn hospitalkostojn. La prezidanto akceptis lian peton kaj donis al ni dek procentan rabaton.

Post kelkaj tagoj la sanstato de Elizabet signifecce pliboniĝis kaj ŝi sentis, ke baldaŭ ŝi povos revojaĝi al Eŭropo. Dum la tago de nia elhospitaliĝo Brila sendis du esperantistojn al la hospitalo por helpi nin aranĝi la aferon. Ŝi eĉ donis sian propran bankkarton al ili, por ke ili povu pagi la hospitalkostojn per ĝi, se la bankterminalo ne povus akcepti niajn eŭropajn bankkartojn. Krom tiuj du esperantistoj ankaŭ Prof. Dr. Park Jong Mok alvenis por helpi nin.

Kaj tiam okazis denove speciala surpriza evento, pri kio niaj koreaj geamikoj diris, ke ili vidis similajn eventojn nur en filmoj. Kiam ni iris al la financa oficisto, kiu traktis la elhospitaliĝajn aferojn, kaj diris al li la nomon de Elizabet, tiam ekaperis la sumo de 5,738,870.- ŭonoj sur la ekrano. Do, laŭ la komputilo ni devis pagi ankoraŭ tiun

sumon. Nia amiko, Daebong tuj fotis tiun ekranbildon. Kaj tiam oni petis, ke nia financa oficisto iru al alia ĉambro. Li forlasis nin por kelkaj sekundoj kaj dum tiu tempo ĉiuj nombroj malaperis en la ek-rano de la hospitala komputilo. Kaj aperis nova bildo, montrante, ke la pagenda sumo estis 0.- ŭonojn, do ni devis plupagi nenion.

Ĉu Esperanto plibonigis la mondon?

D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof (laŭ sia naskiĝnomo: Eliezer Levi Samenhof, laŭ sia oficiale uzata nomo en la tiama Ruslando: Лазарь Маркович Заменгофъ) estis la kreinto de internacia lingvo Esperanto. Li eldonis la unuan Esperanto-lingvolibron en la jaro 1887, kaj oni organizis la unuan Esperanto-Mondkongreson en 1905. En tiu kongreso renkontiĝis esperantistoj el diversaj landoj kaj uzante la facile lerneblan neŭtralan lingvon de Zamenhof ili povis facile komunikiĝi. Tiel evidentiĝis, ke Esperanto estas vere efike uzebla kaj vivkapabla lingvo. Poste fondiĝis diversaj naciaj Esperanto-Asocioj kaj precize cent jarojn antaŭe, en la jaro 1919 fondiĝis la Litovia Esperanto-Asocio.

Por rememori tiun jubilean eventon oni organizis la ĉi-tiu jaran Baltiajn Esperanto-Tagojn kaj kadre de tiu evento la Someran Universitaton. La prezidanto de Litovia Esperanto-Asocio petis, ke mi estiĝu ĉefpreleganto en tiu universitato kaj havu prelegserion en la kampuso de Teknologia kaj Komerca Fakultato de Kaŭna Teknologia Universitato en urbo Panevėžys. La ĉeftemo de la prelegserio estas: „*Ĉu Esperanto plibonigis/plibonigos la mondon?*” Ĉar en mia libroserio, kies titolo estas „*Esperantlingve ĉirkaŭ la mondo*” mi traktis similajn temojn, kiam mi montris kia estas la Esperanto-vivo en diversaj landoj de kvin kontinentoj, pro tio mi decidis fini ankaŭ la lastan libron de tiu libroserio kun la konkludoj de ĉi-tiu prelego.⁴⁹

Laŭ la pensoj de Zamenhof Esperanto estus ne nur facile lernebla, neŭtrala pontolingvo, kiu celus ebligi facilan komunikadon inter di-

49 Krom la somera universitata programo en la Kaŭna Universitato, ĉi-tiu prelego estis la festparolo de la Zamenhofa Festo en Budapeŝto, la 16-an de decembro en 2018. Krome, laŭ planoj la Aŭtoro parolos pri la sama temo ankaŭ dum la 2019-jara Internacia Meditata Renkontiĝo en sudkorea urbo Busan.

verslingvaj kaj diversnaciaj homoj, sed ĝi devus esti speciala komunikilio, per kio la interhomaj rilatoj povus fariĝi pli amikecaj, ĝentilaj kaj pacaj. Sekve de tio la celo de Zamenhof estis plibonigi la mondon. Jam pasis pli ol 130 jaroj post la apero de la unua Esperanto-lingvolibro, do indas esplori: „*Ĉu vere pliboniĝis la mondo per Esperanto?*”

Se ni rigardas, kio okazis dum la lasta jarcento en la homa historio, oni devas konkludi: la mondo tute ne estiĝis pli bona ol ĝi estis dum la antaŭaj jarcentoj kaj jarmiloj. Dum la lasta jarcento okazis la plej teruraj bataladoj kaj militoj de la homa historio. Tiam okazis la unua mondmilito, kiu havis 15 milionojn da viktimoj kaj tiam okazis ankaŭ la dua mondmilito, kies viktimoj estis eĉ pli multnombraj. Laŭ la Vikipedio la nombro de la viktimoj de tiu milito estis pli ol 60 milionoj da homoj⁵⁰. Laŭ aliaj kalkuloj la nombro de viktimoj estis inter 50 kaj 80 milionoj, kiuj mortis rekte pro militaj bataladoj aŭ pro diversaj malsanoj kaj malsatoj okazitaj per la milito.

Multaj landoj, regionoj, nacioj, popoloj kaj kulturoj malaperis dum tiu tempo: ekzemple oni pereis la plejmulton de la eŭropa juda komunumo, tute malaperis la iam fama Orienta Pruslando, la sikuloj perdis sian aŭtonomion kaj mortis la lasta origina tasmania homo, ktp. Krome, la homaro konstruis kaj akumulis dek kvin mil nukleajn bombojn kaj uzante ilin oni povus detruiri la vivkondiĉojn sur la Ter-globo. En tiu senco oni povas konkludi, ke la mondo tute ne estiĝis pli paca kaj amikeca, ol kia ĝi estis antaŭe.

Nun, pli ol cent tridek jarojn post la eldono de la unua Esperanto-lingvolibro, la uzo de Esperanto estas sensignifeca, kaj ni povas sperti ĉiutage, ke la angla lingvo fariĝis ĝenerale akceptata kaj vaste uzata pontlingvo preskaŭ en la tuta mondo. Estas fakto, ke Universala Esperanto-Asocio, la plej grava internacia esperantista komunumo jam havas reprezentantojn kaj landajn asociojn en 120 landoj, tamen ni vidas, ke la interhomaj rilatoj ankaŭ en ĉi-tiu asocio estas ofte malamikecaj kaj malpacaj. Ankaŭ ili ne povas pace kaj amikece kune vivi kaj kune agadi, same kiel multaj aliaj ne-esperantistaj kulturaj,

50 https://en.wikipedia.org/wiki/World_War_II_casualties

religiaj kaj politikaj organizaĵoj de la mondo. Tio estas komprenebla, se ni pensas pri la teorio de Darwin, kiu klarigis al ni, ke batalado por vivo estas la ĝenerala agado de ĉiuj vivuloj por la vivo kaj por la pluvivo.

Ankaŭ mi persone spertis tian malagrablan kverelon kaj bataladon antaŭ kelkaj monatoj en Lisbono dum la Universala Kongreso de UEA. Tiam estis ebleco elekti novan membron por la Komitato, la plej alta decidofaranta organo de la asocio. Antaŭ la elekto grupo de junaj esperantistoj forte klopodis elektigi sian membron por tiu posteno kaj por atingi tiun celon ili provis forte diskreditigi aliajn kandidatojn. Por fari tion, ili laŭtlegis deksepjaran leteron en kiu malamiko de la nedezirata kandidato malĝentile kritikis tiun homon uzante malagrablajn vortojn. Poste estiĝis kverelo kaj protesto en la Komitato kaj ankaŭ la homo, kiu skribis la diskreditigan leteron antaŭ deksepjaraj, laŭte protestis, kaj anoncis, ke oni laŭtlegis sian leteron sen permeso. Kia granda estas la distanco inter tia agado kaj la celo de Zamenhof, kiu volis, ke la esperantistaro estu amikeca kaj pacema komunumo! Komunumo, kies membroj uzas la internacian lingvon por konstrui pli amikecajn kaj pli pacajn interhomajn rilatojn.

Sed ni spertis en Seulo, ke bonŝance estas ankaŭ amikecaj, helpemaj kaj pacemaj esperantistaj komunumoj en la mondo, kies ĉefa karaktero estas kompato kaj solidareco. Certe tia komunumo estas la Esperanto-Asocio de Ŭonbulisma Religio, kies membroj ne nur parolas pri amikeco kaj helpemo, sed ili vere klopodas vivi laŭ la instruo de Sotesano, fondinto de la religio. La ĉefregulo de tiu religio estas la regulo de bonfaroj kaj ni ĉiutage spertis dum la hospitala restado de Elizabet, ke niaj koreaj esperantistaj geamikoj sindoneme helpis nin. Ili ne nur ĉiutage deĵoris apud Elizabet dum horoj, sed ili ankaŭ preĝis por ŝia resaniĝo, eĉ kolektis multe da mono por helpi nin pagi la altajn hospitalokostojn. La Esperanto-Asocio de Ŭonbulismo kontribuis al niaj hospitalaj kostoj per unu miliono da ŭonoj kaj sepdek koreaj kaj japanaj esperantistoj per sep milionoj da ŭonoj.

Krom ili, Dr. Park Jong Mok, esplora profesoro de la Jura Fakultato de Korea Universitato meritas specialan dankon pro sia sindonema

helpemo. Li utiligis eĉ siajn vastajn sociajn kaj diplomatajn rilatojn por atingi, ke Dr. Park Jong Hoon, prezidanto de la Korea University Anam Medical Center signifecce malaltigu niajn hospitalajn kostojn.

Estus bone, se pli multaj similaj esperantistaj komunumoj estiĝus en la mondo, kiuj agadus solidarece kaj amikece laŭ la Zamenhofa instro. Komunumoj, kie la membroj bataladus ne laŭ siaj individuaj intereso, sed ili agadus solidarece por helpi la aliulojn. Tiam povus vere pliboniĝi la mondo kaj tiam povus la homaro atingi la celon, kiun D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof, kreinto de internacia lingvo Esperanto vortumis en sia poemo, kies titolo estas „*La vojo*”.

„Tra densa mallumo briletas la celo,

Al kiu ni kuraĝe iras.

Simile al stelo en nokta ĉielo,

Al ni la direkton ĝi diras.”

Dum la lastaj jaroj mi vizitis multajn landojn de ĉiuj kvin kontinentoj kaj mi rigardis la Esperanto-agadojn ne nur en Eŭropo, la centro de la Esperanto-mondmovado, sed ankaŭ en multaj aliaj lokoj. Laŭ miaj spertoj mi povas konkludi, ke tiu Zamenhofa stelo nun brilas ne en la Eŭropa ĉielo, sed malproksime de Eŭropo, en Orienta Azio, ie super la Han-rivero.



Tradicia domo en hejmvilaĝo de Sotesano, fondinto de Uonbulismo

한강에 빛나는 별

감동적인 이야기

불교를 '자비의 종교' 기독교를 '사랑의 종교'라 하면 원불교는 '은혜의 종교'(4은(四恩): 천지의 은혜, 부모의 은혜, 동포의 은혜, 법률의 은혜)라 할 수 있다. 기독교의 창시자 예수의 말씀에 따르면 '사랑의 지시'는 지구상에서 사람들이 따라야 할 모든 지시 중에서 가장 중요하다. 그러나 원불교를 창시한 소태산 대종사님은 '은혜'가 가장 중요하다고 했다.

원불교 교도들은 말뿐이 아닌 일상생활 속에서도 그 가르침에 따라 도덕적 의무를 실천하고자 한다. 그래서 원불교에스페란토회에서 매년 개최하는 국제선방에서는 참석자들이 오랜 친구를 대하듯 서로 인사를 하며 우정을 나누는 분위기를 경험할 수 있다. 원불교중앙총부(익산)의 정원을 거닐 때 전혀 모르는 사람에게도 인사를 건네며 경의를 표하는 것을 경험했는데, 내 젊은 시절 헝가리의 마을 사람들이 그랬었다.

그런 분위기가 좋아 최근 몇 년 동안 국제선방에 꾸준히 참석했던 나는 금년에도 제 14 차 국제선방 (2018.10.6.~9, 오덕훈련원) 참석을 위해 엘리자벳과 함께 한국을 방문했다. 이번 국제선방에서도 재미있는 문화 프로그램들이 있었는데, 그중 한 단편영화가 감동적이었다. 그 영화의 메시지는 선행이 우리의 삶을 가치있고, 풍부하고 아름답게 하는 가장 좋은 수단으로서 다른 사람을 돕는 것이 인간 공동체에서 가장 좋은 형태임을 보여주었다. 영화 내용은 다음과 같다:

첫 장면은 태국 방콕의 어느 시장 약국에서 약을 훔친 7~8살쯤 되어 보이는 Prajak Arunthong 라는 소년이 잡히고, 약국 여주인의 성난 외침과 큰 질책으로 시작되었다:

- "뭘 훔쳤지? 그걸로 뭘 하려 한 거야?" - 여주인이 화를 내며 물었다.

- "아픈 엄마에게 약을 갖다 주고 싶었어요." - 겁먹은 어린이가 대답했다.

그때 약국 옆 조그만 식당 주인이 나타나서 어린이의 가족을 동정하며 흠친 약값을 약국에 지불하고, 막 요리된 야채스프도 어린이에게 주었다. 약과 스프를 엄마에게 갖고 가도록 그 어린이를 돕고 싶었던 것이다.

30년 후, 갑자기 쇠약해진 요리사가 구급차에 실려 병원으로 갔다. 그리고 병원 치료를 받은 요리사가 792,000 바트(약 2,500 만원)나 되는 병원비 계산서를 받는 새로운 장면이 나타났다. 슬픔에 잠긴 요리사의 가족들은 “뜻하지 않은 병원비 지불을 위해 집을 급매 합니다.” 라는 알림을 자기 집 벽에 붙였다.

며칠 후, 건강을 회복한 요리사의 가족들이 병원으로부터 계산서를 받고 놀라는 마지막 장면이 펼쳐졌다. 계산서에는 있어야 할 금액대신 “지불해야 할 금액은 0 바트입니다”라는 글이 쓰여져 있었다. 그리고 덧붙인 글이 있었다: “이 가족은 이미 30년 전에 약 3 봉지와 야채스프로써 병원비를 지불했습니다.” <병원장 *Prajak Arunthong* 박사>

서울에서 다시 태어나다

14차 국제선방 참석 후, 일본의 첫 수도였던 나라에서 개최된 제2차 한일 공동 에스페란토대회(2018.10.12~14)에 참석했다. 이 대회에서 나는 얼마 전 예일대학 출판부에서 발행된 노벨 생리의학상을 수상(1974년)했던 크리스티앙 드 뒤브 교수의 저서 “*Genetics of Original Sin: The Impact of Natural Selection on the Future of Humanity* (원죄의 유전학: 자연적 선택이 인류의 미래에 미치는 영향)”의 ‘인류문화의 7만년 역사’에 대해 강의를 했는데, 유발 하라리 (옥스퍼드대학 박사, 예루살렘 히브리대 역사학교수)가 자신의 저서 ‘Sapiens’에 그 주제와 관련하여 설명한 놀라운 이론에 대해서도 다루었다. 이 책은 58개의 언어로 번역되어 백만 부 이상 발행될 정도로 세상 사람들의 주목을 받았다.

일본의 아름다운 옛 도시의 문화적 가치를 보기 위해 나와 엘리자벳은 대회 이틀 전에 나라시에 도착했다. 첫째 날, 일본 친구들과 함께 거닐며 이곳저곳

을 안내 받았는데, Today 사원의 Daibucuden 신사에 있는 높이가 15m 나 되는 일본에서 가장 큰 부처상을 보기도 하고, 나라시의 상징이라 할 수 있는 5층탑 주위를 거닐기도 했다. 동물원처럼 갇힌 공간이 아닌 공원이나 거리에서 친근하게 다가오는 사슴들이 놀랍기도 했다. 그렇게 관광을 마치고 중심가에 있는 중국 식당에서 일본 친구들과 함께 저녁식사를 했다.

다음날 아침, 전날 먹은 음식 때문인지 엘리자벳이 복부가 아프다며 구역질을 하면서 고통스러워했고, 대회 내내 프로그램에도 참석 할 수 없었다. 한일대회가 끝난 후, 이미 약속되었던 문일여자고등학교(인천)에서의 영어강의 '인류 문화의 7만년 역사'를 위해 한국으로 다시 돌아왔다. 강의를 마치고 엘리자벳이 기다리고 있는 호텔로 돌아왔을 때 그녀의 몸 상태는 더 안 좋아졌다. 자정이 얼마 남지 않은 늦은 시각, 급히 구급차를 불러 호텔 근처에 있는 고려대 안암병원 응급실로 갔다.

구급차 사용료와 첫 검사비로 220,000 원을 우선 지불했는데, 정확한 진단을 위한 다른 검사(CT 촬영이나 혈액성분분석 등)를 위해 백만 원을 더 지불해야 한다고 했다. 그렇게 추가지불을 한 후, 엘리자벳은 응급실에서 검사를 받을 수 있었고, 몇 시간 후 장폐색이란 진단이 내려졌다. 소장이 막혀 활동하지 않으므로 치료를 위해선 반드시 입원이 필요했고, 입원을 위한 선금 4백만 원을 또 지불해야 했다.

엘리자벳은 외국인병실에 입원을 하고 치료를 받았지만, 며칠 후 상태가 더 안 좋아진 것이 확실해졌고 수술을 피할 수 없게 되었다. 장폐색 외 폐렴도 있어서 생명까지 위험한 상황이었다. CT 촬영 결과 폐동맥에 색전증이 발견되고, 폐경색도 보일 때는 더 심각해졌다.

마취전문의에 따르면 수면가스가 폐의 상태를 더 안 좋게 하고, 혈액응고방지제의 사용 때문에 필요한 수술이 가능치 못할 위험도 있었다. 색전증 치료를 위해선 혈액응고방지제의 사용이 반드시 필요함에도 불구하고 그 치료를 멈춘다면, 폐색전증 증상이 더 커지고 더 심각해질 위험이 따랐다.

이런 심각한 상황을 알게 된 한국 친구들(대부분이 원불교에스페란토회 회원들)이 유럽에서는 한 번도 겪어보지 못한 매우 효과적으로 그리고 헌신적으로 우리를 돕기 시작했다. 입원을 위해 4 백만 원을 우선 지불해야 되는 상황에서 내 카드의 일일 최소 결제금액 때문에 전 금액을 지불할 수 없다는 소식을 접한 전대봉, 조명자 부부가 즉시 병원으로 달려와 부족한 금액 2 백만 원을 건넸다. 그들은 병원 가까이에 살지도 않고, 서울에서 45km 나 떨어진 부천에 사는 나의 오랜 친구들이다.

장폐색에 일반적인 치료만으로는 효과가 없어서 수술을 피할 수 없게 되었고, 게다가 수술도 서둘러야 할 상황이 확실해졌다. 담당의사 백세진 교수가 수술을 했고, 그녀의 뛰어난 의술과 정성 덕분에 수술은 다행히 성공적이었다. 수술 후 엘리자벳은 색전증의 위험 때문에 중환자실에서 혈액응고방지제 치료를 받기 시작했다. 그러나 5 일 후 피가 지혈되지 않아서 혈액응고방지제 치료를 중지해야 하는 위기의 순간이 왔지만, 자연의 섭리에 맡기고 기다리는 것 외에는 아무것도 할 수 없었다. 이렇듯 약조차 사용할 수 없는 위험한 경우에는 초자연적인 힘만이 환자의 삶을 구할 수 있다고 믿을 뿐이다.

엘리자벳의 심각한 상황을 알고서 오랜 친구 한숙희 씨가 원불교진동교당에서 엘리자벳의 건강 회복을 위한 '100 일 기도'를 시작하는 등 한국뿐 아니라 유럽과 아메리카 대륙에서도 친구들의 기도가 이어졌다. 그리고 한국 친구들은 순서를 정해 매일 병원을 방문하여 의사, 간호원과의 의사소통을 돕고, 내가 자리를 비우는 동안 엘리자벳을 간호하도록 했다. 덕분에 나는 공식적인 일들을 처리하고, 몸을 씻고, 옷을 갈아입기 위해 외출을 할 수 있었다. 엘리자벳의 용기를 북돋아 주기 위해 10 명도 넘는 친구들이 방문하는 날들도 있었는데, 그 중에는 8 시간을 걸려 온 친구도 있었다.

고려대 안암병원의 수준 높은 의술 덕분에, 그리고 엘리자벳의 건강을 위해 기도해 주고 지지해 준 한국 친구들의 도움 덕분에 엘리자벳의 건강상태는 호전되기 시작했고, 며칠 후 퇴원도 가능해 보였다. 생명까지 위협했던 상황을 생각하면 엘리자벳은 서울에서 다시 태어난 거나 다름없었다. 입원비

로 400 만원을 이미 지불했지만 10 일간의 치료비로 다시 계산된 병원비는 총 2,900 만원이었다.

그동안 나는 엘리자벳의 병뿐 아니라 지불할 능력이 없을 만큼 많아졌을 입원비도 걱정 하면서, 엘리자벳의 회복과 함께 어떻게 병원비를 마련할 수 있을지 기도를 해야만 했었다. 한 번도 한국 친구들에게 그런 걱정을 하지 않았지만 그들은 이미 알고 있었다. KEA 부회장이자 원불교에스페란토회 부회장인 오순모 선생이 한국 에스페란티스토 카톡방에 내 입장을 설명하고 모금에 동참해 주기를 요청하는 글을 올린 것이다.

24 시간동안 유럽 에스페란토 공동체에서는 한 번도 경험하지 못한 기적이 일어났는데, 우리를 재정적으로 지원하기 위해 하루에 8 백만 원 이상이 걷힌 것이다. 그리고 에스페란티스토들만 우리를 도우려한 것이 아니었다는 것은 또 다른 즐거운 놀람이었다. 오순모 부회장의 글을 읽은 사람들 중에 고려대학교 법학과 연구교수 박종목 박사가 있었는데, 한국에스페란토협회 회원도 아니고 원불교에스페란토회에도 속하지 않은 그가 우리를 돕기로 하고, 병원장에게 병원비를 낮춰주기를 부탁했고, 그 부탁이 받아들여져 10%의 할인을 받을 수 있었다.

며칠 후, 헝가리로 돌아갈 수 있을 정도로 엘리자벳의 건강이 회복되었다. 퇴원하기 전 날, 우리를 돕고자 박종목 교수가 전대봉 선생을 통해 연락을 해왔다. 퇴원하는 날에는 한국 동지들이 모금한 금액으로 마지막 병원비를 지불해 주기 위해 출근을 해야 하는 오순모 부회장을 대신해서 김우선 님과 박종목 교수의 부탁으로 전대봉 님이 병원을 방문하고, 박종목 교수도 병원으로 왔다. 그리고 또 다시 놀라운 기적이 일어났는데, 한국 친구들은 영화에서나 볼 수 있는 일이라고 했다. 퇴원을 위해 수납창구로 갔을 때 컴퓨터 화면에는 내가 지불해야할 금액 5,738,870 원이 나타났다. - 그 순간 전대봉 님이 화면에 나타난 금액을 사진으로 남겨두었다 - 그런데 수납 직원이 다른 방으로 잠시 불러가더니 컴퓨터 화면의 그 금액이 완전히 사라졌다. 그리고 '금액은 0 원이며, 지불할 돈은 전혀 없다'는 새로운 화면이 나타났다. 불과 몇 초 동안에 벌어진 기적 같은 일이었다.

에스페란토가 세상을 더 좋게 할까요?

국제어 에스페란토의 창안자 자멘호프 박사는 - 당시 러시아에서 공식적으로 사용된 태명은 Eliezer Levi Samenhof: Лазарь Маркович Заменгофъ - 1887 년에 '에스페란토 제 1서'를 발표했다. 그리고 1905 년 프랑스에서 제 1 차 세계에스페란토대회(UK)가 개최되어 여러 나라의 에스페란티스토들이 만남을 갖고, 자멘호프 박사의 쉽게 배울 수 있는 중립어(국제어)를 사용하면 쉽게 교류할 수 있었다. 그렇게 에스페란토는 효과적으로 사용 가능한 살아있는 언어라는 것이 명백해졌다. 그 후 여러 나라에 국가협회가 설립되고, 정확히 100 년 전 1919 년에 리투아니아에스페란토협회가 설립되었다. 그리고 2019 년 리투아니아협회의 100 주년을 맞이하여 Baltiaj Esperanto-Tagoj (발트에스페란토대회, 2019.7.6.~14)를 파네베지스 시의 카우나 기술대학에서 개최하기로 했다. 리투아니아협회 회장의 부탁에 따라 나는 BET 의 'Somera Universitato'(하계대학)에서 강의를 하게 되었는데, 강의 주제는 "Ĉu Esperanto plibonigis/plibonigos la mondon?"(에스페란토는 세상을 더 좋게 했는가/할것인가?)이다. 나의 저서 "Esperantlingve ĉirkaŭ la mondo (에스페란토 언어로 세계를) 시리즈에서 5 대륙 여러 나라에서의 에스페란토 삶을 보여줄 때 비슷한 주제를 다루었기 때문에, 이 강의의 결론과 함께 그 도서 시리즈의 마지막 책을 끝내고자 한다.⁵¹

자멘호프 박사에 따르면 에스페란토는 다양한 언어를 사용하는 여러 민족 간의 쉬운 교류를 가능케 하는 쉽게 배울 수 있는 중립적인 교량언어뿐 아니라, 사람들과의 관계가 더 친밀해지고, 예의바르고, 평화로울 수 있는 매개체가 되어야 할 것이다. 따라서 자멘호프 박사의 목적은 세상을 더 좋게 하는 것이다. "에스페란토 제 1서"가 발표되고 벌써 130 년이 지났으니 "Ĉu vere pliboniĝis la mondo per Esperanto? (에스페란토로서 세상이 정말 좋아졌습니까?)를 연구해 볼만하다.

51 카우나 기술대학 '하계대학' 외에도 2018 년 12 월 16 일 La 159a Zamenhof-Tago (59 차 자멘호프 탄신제) 행사에서도 이 강의를 했다. 그리고 2019 년 15 차 국제선방에서도 강의를 하고자 한다.

인간 역사의 마지막 세기에 무슨 일이 일어났는지를 본다면, 세상은 수백 년 수천 년 전보다 전혀 좋아지지 않았다. 지난 세기에 1,500 만 명의 희생자를 낸 제 1차 세계대전과 그보다 더 많은 희생자를 낸 제 2차 세계대전 등 인류 역사상 가장 끔찍한 싸움과 전쟁이 일어났다. 위키피디아에 따르면 2차 대전 때의 희생자 수가 6,000 만 명 이상이라고 하는데,⁵² 전쟁으로 발생한 병과 굶주림으로 인한 희생자까지 합치면 5,000 만~8,000 만 명 정도가 된다고 한다.

많은 나라, 지역, 민족, 문화들이 그 시기에 사라졌다. 예를 들어 많은 유대인들이 죽고, 언젠가 유명했던 동부 프러시아가 사라지고, 시칠리아인들은 자치권을 잃고, 타스마니아의 마지막 원주민도 죽었다. 그 외에도 인류는 15,000 개의 핵폭탄을 만들어 보유하고 있다. 그 폭탄들이 지구상의 모든 삶의 조건을 파괴할 수 있는 상황에서는 이 세상은 전보다 더 평화롭지 못하고 친밀해질 수 없을 것이다.

‘에스페란토 제 1서’의 발표 후 130 년이 지났지만, 영어가 거의 전 세계에서 받아들여지고 교량언어로서 널리 사용되는 요즘, 에스페란토를 사용하는 것만으로는 의미가 없겠다. 세계에스페란토협회는 가장 중요한 국제적 에스페란토 공동체이고 이미 120 개국에 국가협회와 대표들을 가지고 있다. 그러나 이 협회도 비에스페란티스토들의 문화, 종교, 정치 단체들처럼 인간관계가 적대적이고 평화롭지 못하다는 것을 우리는 종종 볼 수 있다. Darwin의 이론에 따르면 다툼은 삶을 위해, 그리고 계속 살아남기 위한 모든 생명체의 일반적인 행동이니 이해할 수는 있겠다.

개인적으로 그런 불쾌한 논쟁과 다툼을 몇 달 전 리스본 UK에서 경험했다. 세계에스페란토협회의 최고 결정 기관인 Komitato(위원회)의 새 회원을 선출할 때였다. 선거 전, 젊은 에스페란티스토들이 자기 회원을 뽑고자 다른 후보자들을 강하게 헐뜯으려 하고, 점잖지 못한 말들로 상대방을 비판했던

52https://en.wikipedia.org/wiki/World_War_II_casualties

어떤 후보자의 17년 전 편지를 크게 읽기도 했다. Komitato 에서는 논쟁과 항의가 일어나고, 17년 전 편지를 썼던 그 후보자도 허락없이 자신의 편지를 소리 내어 읽었다며 크게 항의를 했다. 그러한 행동은 우정으로 가득한 평화적인 에스페란토 공동체가 되기를 원했던 자멘호프 박사의 목적과 얼마나 큰 차이를 보이는가! 에스페란토 공동체는 회원들의 더 친밀하고 더 평화적인 인간관계를 위해 국제어 에스페란토를 사용하는 단체이다.

그러나 세상에는 우정으로써 돕고자 하고, 평화를 추구하는 자비와 일치단결로 뭉친 에스페란티스토 공동체가 있다는 것을 나는 서울에서 경험했다. 말만 내세우지 않고 원불교의 창시자인 소태산의 가르침 '은혜'에 따라 실천하려고 노력하는 원불교에스페란토회가 바로 그런 공동체이고, 한국 에스페란티스토들이 그러했다. 엘리자벳이 입원하고 있는 동안 그들은 매일 몇 시간씩 엘리자벳의 간호를 도울 뿐 아니라 엘리자벳의 회복을 위해 기도도 하고, 비싼 병원비를 지불해야하는 우리를 돕기 위해 많은 돈을 모금하는 등 헌신적으로 돕고자 했다. 원불교에스페란토회에서 100만원, 90여명의 한국친구들이 730만원, 내 상황을 알게 된 3명의 일본 친구들도 30만원을 보내와 큰 도움이 되었다. 그동안 물심양면으로 도움을 준 모든 친구들에게 고마운 마음을 전한다. 그 외 자신의 폭 넓은 사회적 외교적 관계를 이용하면서까지 고려대학교 안암병원장인 박종훈 박사께 도움을 청하여 병원비를 낮출 수 있도록 도움을 준 고려대학교 법학과 교수 박종목 박사께도 특별한 감사를 전한다.

자멘호프 박사의 가르침에 따라 일치단결하여 우정으로써 활동하는 에스페란티스토 공동체가 이 세상에 더 많이 존재하면 좋겠다. 개인적인 관심에 따라 싸우지 않고 다른 사람들을 돕기 위해 단결하여 활동하는 단체들이 있을 때, 세상은 더 좋아질 것이고, 인류는 국제어 에스페란토의 창시자 루도비코 라자로 자멘호프 박사가 자신의 시 'La vojo'에 밝힌 그 목표에 도달할 것이다.

*“Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu ni kuraĝe iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.”*

*“우리가 용기를 내어 가야할 목표가
짙은 어둠 속에서 반짝인다
밤하늘의 별처럼
그것은 우리에게 방향을 가리킨다.”*

최근 몇 년 동안 나는 5 대륙의 많은 나라들을 방문했다, 그리고 에스페란토 운동의 중심지라 할 수 있는 유럽뿐 아니라 다른 나라에서도 에스페란토 운동을 실감했다. 내 경험에 비추보면 자멘호프 박사의 그 별은 지금 유럽의 하늘이 아닌 유럽 멀리 있는 동아시아의 한강 위 어딘가에서 빛나고 있다. ♣



Elisabet, la Aŭtoro kaj Ikai Yosikazu, prezidanto de Nagoja Esperanto-Centro antaŭ la Namdaemun (Suda Urba Pordego) de Seŭlo, la sud-korea ĉefurbo apud la Han-riverbordo

CENT MIL KILOMETROJ POR ESPERANTO

Intervjuo kun D-ro Márkus Gábor⁵³

.....

D-ro Márkus Gábor estas unika figuro en la internacia esperantista komunumo, ĉar dum sia tuta faka kariero li utile uzis la internacian lingvon kiel strategia manaĝero de la plej granda hungara industria organizo kaj ankaŭ kiel direktoro de sia parlamenta kontrola kaj aŭditora organizo, kiam li kontrolis sian registaron. Post emeritiĝo li laboras kiel prezidanto de la Eŭrazia Kultura Centro, kie li efike helpas la instruadon de Esperanto en diversaj aziaj universitatoj kaj sociaj organizoj. Dum la lastaj jaroj li gvidis kursojn en la korea Indramang Universitato, prelegis en la seula kaj suwona kampusoj de la Kyunghee Universitato, motivis la studentojn de la korea Wonkwang Universitato kaj li enkondukis la instruadon de la esperanta lingvo en la Srinakharinwirot Universitato en Bangkok, Tajlando.

La Redaktoro

.....

FJ: Vi estas eŭropano, sed vi agadas tre ofte ankaŭ en Azio kaj Oceanio. Kial vi fondis la Eŭrazian Kulturancentron?

MG: Fakte ne mi fondis la EKC-n. Estas jam longa tradicio en nia Hungaria Esperanto-Asocio ke oni helpas disvastigi la Esperantomovadon en diversaj aziaj landoj. Post la unua mondmilito hungaro, kies nomo estis Fedorĉak instruis la internacian lingvon en multaj ĉinaj kaj japanaj urboj kaj nia iama prezidanto Julio Baghy gvidis kurson kaj fondis Esperanto-klubon eĉ en siberia militkaptitejo. Sekvante tiun tradicion laŭ la propono de Nagy János vicprezidanto, nia Hungaria Esperanto-Asocio fondis la EKC-n kaj nomumis min ĝia prezidanto.

53 Ĉi-tiu artikolo aperis en la 2016/decembra numero de revuo „*Esperanto*”, oficiala organo de UEA

FJ: Estas ankaŭ personaj kialoj, ke vi estiĝis la estro de tiu organizo?

MG: Kompreneble, jes. Kiam mi estis juna, tiam mi ricevis financan subtenon de la japana entrepreno Verda Stelo por studi en la Nanzan Universitato por ricevi doktorecon en la japana ekonomiko. Tiam mi estis malriĉa orienteŭropa studento en la riĉa Japanio kie la loka esperantista komunumo helpis min kaj ebligis, ke mi sukcese faru mian studprogramon. Nun mi jam estas maljuna kaj mi pensas, ke nun mi devas helpi la junularon pere de Esperanto. Kaj ankaŭ prof-ro Nanovfszky György, honora prezidanto de ambaŭ HEA kaj EKC havas fortajn rilatojn kun Azio. Li doktoriĝis en lingvistiko, analizante la arabdevenajn vortojn en la indonezia lingvo. Poste li laboris kiel ambasadoro de Hungario en multaj aziaj landoj kaj kiam li estis en Singapuro, tiam li fondis la lokan Esperanto-Asocion kune kun la frato de la singapura ĉefministro. Kaj ankaŭ d-ro Molnár Lajos, alia estrano de EKC efike evoluigas la kulturan kaj sciencajn interŝanĝojn inter Eŭropo kaj Orienta Azio invitante aziajn grupojn al la kunvenoj de sia Budapeŝta Medicina Fakgrupo.

FJ: Kiel helpas la EKC disvastigi la esperantan lingvon en Azio?

MG: Nia organizo regule okazigas Esperanto-kursojn por azianoj kaj en Eŭropo kaj en Azio. Mi persone invitas aziajn studentojn kaj profesorojn al Budapeŝto kaj sendas eŭropajn esperantistojn al Azio. Ni sendas lernolibrojn senpage por aziaj kursoj, se necesas, tiam ni sendas ankaŭ instruistojn kaj finance subtenas la plej diligentajn kursanojn por ke ili partoprenu internaciajn Esperanto-kunvenojn. Laŭ la propono de niaj tajlandaj studentoj EKC donas atestilojn aŭ diplomojn al la studentoj, kiuj sukcese finas nian studprogramon kaj ni aŭdas kun ĝojo ke niaj studentoj bone povas uzi tiujn dokumentojn por fari sukcesan fakan karieron. Nia Centro ofte gastigas aziajn esperantistojn en Eŭropo, ekzemple antaŭ kaj post la Universalaj Kongresoj en Lille kaj Nitra pli-malpli dudek alilandaj esperantistoj gastigis ĉe ni. Estis grava evento por internacia amikiĝo, ke post la jubilea UK sub la gvido de Lindwurm Edit kaj Oh Soonmo, vicprezidantinoj de HEA kaj KEA hungara-orientazia komuna karavano vizitis la plej interesajn vidindaĵojn en Francio, inter aliaj la Esperanto-kastelon en

Gresillon, la reĝan palacon en Versailles kaj la fortikaĵon en Avignon kie la papoj estis kaptitaj. Pri la agado de nia Eŭrazia Kultura Centro oni povas informiĝi pli detale ankaŭ en la interreto vizitante la hejmpaĝon: <http://esperanto.center/2016/11/13/326>

FJ: Estas konate, ke vi publikis pli ol ducent librojn kaj artikolojn en diversaj fakaj kaj sciencaj ĵurnaloj, inter aliaj ankaŭ en la organoj de la Ĉefministra Oficejo kaj la Hungara Financministrejo kaj ankaŭ en ili vi popularigis la Esperanton.

MG: Jes, sed tio estis nur malrekta popularigo. Dum mia vivo mi partoprenis multegajn sciencajn kaj fakajn kongresojn kaj konferencojn kie ni traktis diversajn ekonomikajn, komputteknikajn kaj sociosciencajn temojn kaj publik-administradajn metodojn. En tiuj konferencoj krom la angla, la ĉina, kaj la rusa lingvoj (la plej ofte uzataj interlingvoj en Orienta Eŭropo kaj Azio) ankaŭ la esperanta lingvo estis akceptata, kiel laborlingvo. Kaj en tiuj verkaĵoj mi raportis ĉefe pri la sciencaj konkludoj de la renkontiĝoj kaj mi menciis nur paren-teze, ke mi uzis la internacian lingvon dum la laborkunsidoj.

FJ: Sed en via libroserio „Esperantlingve ĉirkaŭ la mondo” vi ankaŭ rekte popularigas nian internacian lingvon.

MG: La ideo por reeldoni miajn publikaĵojn, kiujn mi verkis dum mia studenta tempo en Japanio venis de Ferenczi Ildikó kaj Baksa József, estroj de nia esperantista komunumo en sudhungara urbo Sze-ged. Tiu libro aperis sub la titolo „Ruĝa suno kaj verda stelo” kaj oni reeldonis la libron ankaŭ en japana kaj hungara lingvoj. La libro estiĝis tre sukcesa kaj pro tio poste ni daŭrigis la libroeldonadon sub la titolo „Esperantlingve ĉirkaŭ la mondo”. La membroj de tiu libroserio aperis jam ankaŭ en ĉina, korea kaj taja lingvoj kaj montras, ke en nia dudekunua jarcento la Esperanto jam estas vaste uzata en multaj landoj de ĉiuj kontinentoj. Legante la librojn evidentiĝas, ke jam estas mondskala reto de Esperanto-kluboj, kie ne estas membrokotizo, la membroj devas nur oferti kelkajn semajnojn por ellerni la lingvon. Vidante la sukceson de la libroserio, kalifornia esperantisto Enrique Ellemberg konstruis hejmpaĝon <http://esperantofre.com/mondo/mg-libroj.htm> kie la libroj senpage legeblas.

FJ: Dum unu jaro vi prelegis kaj instruis en diversaj universitatoj kaj Esperanto-renkontiĝoj en Tajlando, Koreio, Indonezio, Slovakio, Ĉinio kaj Japanio. Vi certe vojaĝas cent mil kilometrojn por Esperanto, ĉu ne?

MG: Pli ol cent mi kilometrojn. Ĉar post kelkaj tagoj mi vojaĝos ankaŭ al Tanzanio kaj laŭ la peto de Stefan MacGill kaj Lee Jungkee ni diskutos kun niaj afrikaj gesamideanoj kiel nia EKC povus helpi la disvastigon de Esperanto ankaŭ en Afriko. Nia internacia lingvo riĉigis mian vivon kaj helpis mian profesion karieron kaj mia celo estas, ke nia Eŭrazia Kultura Centro helpu la aziajn kaj afrikajn esperantistojn por ke ankaŭ ili spertu similajn sukcesojn.

D-rino Farkas Julianna



Gestudentoj de Esperanto-kurso de la Aŭtoro en la King Mongkut's Institute of Technology Thonburi. Tio estis speciala universitata projekto, en unu el la plej prestiĝaj tajlandaj universitatoj.

**La libroj de la Aŭtoro, aperigitaj en la libroserio
„Esperantlingve ĉirkaŭ la mondo”**

- . Ruĝa Suno kaj Verda Stelo
- . 赤い太陽と緑の星
- . Vörös Nap és Zöld Csillag
- . 황해를 넘어서
- . Trans la Flava maro
- . Sudorientaziaj vojaĝoj
- . Délkelet-ázsiai utazások
- . 东南亚之旅
- . Tavasz a Szentföldön
- . A kenguruk földién
- . 인드라마대학 - 에스페란토 강의 (1 부)
- . 인드라마대학 - 에스페란토 강의 (2 부)
- . Buddha ölelő karjaiban
- . Koreio, la kongreslando
- . แบบฝึกหัดภาษาเอสเปรันโต โดย ดร. มาร์คัส การ์บอร์
- . A Nanzantól a Namsanig
- . Európa válaszút előtt
- . A trópusok világa
- . Az északi fénytől a Dél Keresztjéig
- . Ĉu Esperanto plibonigis/plibonigos la mondon?

**La verkoj de la Aŭtoro legeblas angle, esperantlingve, hispane,
koree, hungare, ĉine, japane kaj taje en la venontaj retpaĝoj:**

<http://esperantofre.com/mondo/mglibroj.htm>
<http://esperantofre.com/mondo/mgeuropo.htm>
<http://esperantofre.com/mondo/mglegu.htm>
<http://esperantofre.com/mondo/flavae.htm>
<http://esperantofre.com/mondo/flavah.htm>
<http://esperantofre.com/mondo/flavaa.htm>

**Informoj pri la Eŭrazia Kultura Centro, kies prezidanto estas la
Aŭtoro, troveblas jene:**

<http://esperanto.center/2016/11/13/326>
<http://esperantofre.com/mondo/ekce.htm>